

Bulgara ESPERANTISTO





Junpioniroj el lernejo „Ivan Haĝijski“ — u. Trojan, prezentaas belartan programon antaŭ la partoprenantoj de la interdistrikta E-renkontiĝo en la sama urbo (majon, 1976)



La fondintoj de E-Societo „Paco“ en u. Jakoruda (vd. paĝon 4)



ENHAVO

* * *	La batalo por sobereco — tasko ankaŭ de la esperantistoj	1
	Rusi Miĥov. Kvindekjara jubileo de „Mondpaco“	2
	T. M. Celebro de du veteranoj	3
	Minko Conkovski. La agado de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“	3
	VI. Gjoŝev. E-societo en Jakoruda	4
	Rondanoj. E-aktiveco en Drjanovo	4
	Petranka Ilkova. E-kurso en Ŝumen	4
	Ana Mindova. Memore al Kalocsay	4
* * *	El la salutparolado de N. Aleksiev al la kongreso de la bulgaraj filatelistoj	5
	Georgi Uzunski. Vojo tra la jaroj	5
	Canko Murgin. La unua bulgara esperantisto	6
	Ĥr. Iskrov. Li falis por la libero	8
* * *	Esperanto-komponisto	10
* * *	Koncizaj novaĵoj	10
	Prof. d-ro Stojan Ĝuĝev. Ekaperas „Scienca Mondo“	11
	Dimitro Haĝiev. Soveta lingvisto pri Esperanto	12
	Mladen Isaev. Adorkliniĝo. Tradukis D. Haĝiev	13
	Ivan Vazov. La karavano. Tradukis Simeon M. Simeonov	13
	Stefan Sokolov. Ĉe la ŝtonego	14
	Ivan Draganov. Printempo en maljuneco	15
	Ljuba Bojaĝieva. Septembra vento	17
	Junulina kanto	17
	Aŭtuna humoro	17
	Nevena Nedelĉeva. La plej juna bofilino	18
	Mihail Ĉobanov. La rideto de estonta patrino	19
	Nadja Jejnova. Bombardo	20
	Asen Grigorov. Oraĵ Sabloj	21
	Proŝo. La homeco kaj ties valoro	22
	Dimitro Dimov. Okuloj	25
	Penka Papazova. Mia amata ter'	26
	Violin Cljanov. Amiko	26
	Najden Vâlĉev. La sovela soldato. Tradukis Lili Koleva	27
	Ĥristo Radevski. La leono kaj la kameleono. Tradukis D. Haĝiev	27
	Ivan Turgenev. Miaj arboj. Tradukis Rajna Konstantinova	28
	Penjo Stojanov. Kompaso	28
	Ismet Ĉebi. La mono. Tradukis A. Asker	28
	A. S. Puŝkin. Malliberulo. Tradukis N. Fedotov	29
	Miŝo Zdravev. Per Esperanto mi ĉirkaŭprenis la mondon	29
	Ljudmila Jevsejeva. Gutas pluvo	
	Ni gladu mem	32
	Flori Nikolov. Enigmo	32
	Miŝo Zdravev. Bulgario (kanto)	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Antaŭ la E-domo en Pazarĝik — post la celebros de la E-veteranoj Ivan Vasilev kaj Kosta Konstantino (vd. p. 3)

Partoprenantoj en la celebros de la 50-jariĝo de E-Societo „Mondpaco“ — u. Karnoba (vd. p. 2)



LA BATALO POR SOBRECO — TASKO ANKAŬ DE LA ESPERANTISTOJ!

Nia lando utiligas ĉiujn siajn fortojn por la konstruado de matura socialisma socio. Por realigi tiun taskon oni bezonas sanan, fortan, sobran kaj entuziasman generacion. Elirante el tiu pozicio la partiaj kaj ŝtataj organoj en nia lando sisteme zorgas pri laŭgrada limigo kaj en perspektivo pri plena likvido de la drinkado kaj fumado, por elradiko de tiuj kutimoj, hereditoj de la antaŭa sociordo en nia lando.

Nia socio havas vivgravan intereson realigi tiun malfacilan, sed noblan taskon en la nomo de la homa sano kaj la plua florado de nia socialisma patrujo.

La statistiko montras, ke la konsumado de alkoholaĵoj kaj tabakaĵoj en iuj tavoloj de nia loĝantaro kreskas. Tio bedaŭrinde rilatas speciale pri iuj medioj de la juna generacio kaj reflektas malfavore je tuta vico da socialaj, sanprotektaj, etikaj, ideologiaj kaj ekonomikaj interesoj de la socio kaj de la aparta civitano. Tio postulas ankoraŭ pli striktan batalon kontraŭ la alkoholismo kaj la tabakfumado. „Ni devas purigi la socian kampon, — emfazas Todor Ĵivkov, — de ĉiuj fiherboj, de ĉiuj faktoj de mallaboremo, skandalado, karierismo, drinkado kaj malmoraleco“.

Nova pruvo pri la kreskinta zorgo de la Bulgara Komunista Partio kaj la ŝtato pri la bonstato de nia popolo prezentas la nova dokumento de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio kaj la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario. Ĝi estas titolita — „Fundamentaj direktivoj de la ŝtata kaj socia agado por sobreco“. Surbaze de tiu dokumento la Ministra Soveto aprobis specialan dekreton pri la taskoj de la apartaj ministerioj, institucioj, popolaj sovetoj kaj la ceteraj ŝtatorganoj kaj institutoj. La Prezidiumo de la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto, kiel organo, kiu kunordigas la klopodojn rilate gravajn problemojn de tutnacia karaktero, aprobis vastan programon ĝis 1980 jaro pri la taskoj de la sociaj organizaĵoj kaj movadoj lige kun la batalo por sobreco.

Ĉiuj cititaj dokumentoj antaŭvidas, ke la batalo kontraŭ la drinkado kaj tabakfumado devas esti gvidata pli celkonscie, kompleksmaniere kaj sur scienca bazo, per la unuigitaj fortoj de la ŝtataj kaj sociaj organoj kaj organizaĵoj. Je la nuna etapo la ĉefa atento estas koncentrata kontraŭ la trouzado de alkoholo kaj tabakfumado, por profilaktika laboro inter la junularo kontraŭ konsumado de alkoholaĵoj kaj tabakaĵoj.

Ankaŭ porestante la ĉefa rimedo en tiu batalo restas la eduka kaj propaganda laboro, atente ligata kun socialaj kaj ekonomikaj rimedoj, kun

administraj kaj juraj sankcioj kontraŭ ĉiuj rompoj de la normoj, ligitaj kun la batalo kontraŭ la alkoholismo kaj tabakfumado.

En la realigado de tiuj altnoblaj kaj patriotismaj celoj gravan rolon devas ludi ankaŭ la sociaj organizaĵoj kaj movadoj. La problemoj de la sobreco devas esti en la centro de ties atento, ili devas transformiĝi en aferon de la tuta popolo. Estas antaŭvidata pliintensiĝo de la edukaj, kunordigaj kaj kontrolaj funkcioj de la Nacia Komitato de Sobreco kaj ties lokaj organoj.

La sobreca konduto estas parto de la socialisma vivmaniero. La specifikeco de la problemo pri la malutileco de la alkoholo kaj la tabako postulas, ke la propagandan laboron oni faru diference, individue, per la helpo de kompetentaj aŭtoritataj personoj — medicinistoj, pedagogoj, ekonomiistoj, juristoj, sociaj agantoj k. a.

La Estraro de la Bulgara Esperantista Asocio aprobis specialan programon por partopreno de la esperantistaro en la realigo de tiu grava tuta-popola tasko memstare kaj kunlabore kun la ceteraj sociaj organizaĵoj kaj movadoj, sub la gvido de la Patrolanda Fronto, kies kolektivaj membroj estas nia asocio kaj ĉiuj esperantistaj societoj. La programo, valida ĝis 1980 jaro, estas distribuita inter la distriktaj komitatoj kaj la estraroj de niaj societoj kaj ili devas pritrakti ĝin funde, aplikante praktikajn rimedojn por ties plenumado.

Ni estas certaj, ke la alvoko de la Partio kaj la Ŝtata Soveto pri sistemaj kaj energiaj klopodoj por plua disvolvigo de la sobreca movado estos akceptitaj de ĉiuj esperantistoj. Kune kun la plifortikiĝo kaj plua kreskado de tiu movado nia popolo ĉiam pli kaj pli vaste konservos kaj evoluigos siajn naciajn kaj homajn virtojn kaj dignojn.

ORGANIZA VIVO

KVINDEKJARA JUBILEO DE „MONDPACO“

La 9-an de majo la esperantistoj de u. Karnobat kolektiĝis en la loko „Ĥiĵata“ apud la urbo por celebri 50-jaran jubileon de sia E-Societo „Mondpaco“. Por prepari bone la celebron ili estis helpitaj de UK de BKP, UK de la Patrolanda fronto, UK de la Batalantoj kontraŭ la Faŝismo kaj aliaj sociorganizaĵoj.

La celebrego estis malfermita de la societa membro Vasil Janev, kiu donis la parolon al Geno Kurdov — la plej aĝa membro de la societo. Tiu salutis emocie la ĉeestantojn. Raporton pri la plej gravaj momentoj en la 50-jara vivo kaj agado de la societo faris ĝia prezidanto Rusi Mihov.

Eldirojn faris ankoraŭ kelkaj kamaradoj. Ĉiuj substrekis la gravan progreseman agadon de la societo dum la periodo de la faŝismo en nia lando. En ĝi membris laboristoj, lernantoj, studentoj. Dank' al la facileco de Esperanto ili povis ĝin ellerni kaj kontakti pere

de ĝi kun demokratiaj homoj el la tuta mondo. La oficiala potenco kaj la polico tiutempe ĉiam rigardis malamike la esperantistojn.

La ĉeestantoj estis salutitaj de la unua sekretario de UK de BKP inĝ. Dimitro Markov. Li substrekis, ke antaŭ la 9. 9. 1944 la plejmulto de la membroj de „Mondpaco“ estis progresema homoj, kontraŭfaŝistoj. El la vicoj de „Mondpaco“ eliris bravaj popolaj filoj kiel Ganĉo Hardalov, Gospodin Nanev, Vasil Miĥalev ka., kiuj heroe pereis en la kontraŭfaŝisma batalo en 1943 kaj 1944 j.

Celebrante la 50-jariĝon de nia amata E-societo ni ĉiuj klare konscias, ke la revoj de la E-pioniroj kaj kontraŭfaŝismaj batalantoj en nia urbo nun realiĝas — ni entuziasme konstruas novan feliĉan socialisman socion, en kiu la laboro de la esperantistoj ricevas altan rekonon.

Rusi Mihov





VERDA TABULO

En la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1976 j. k-do KIRIL KALČEV — membro de E-Societo „Espero“ en urbo Loveč, varbis 96 abonantojn.

Dankon al k-do Kalčev pro lia fervora laboro!

CELEBRO DE DU VETERANOJ

La 13-an de junio en la propra klubejo de E-Societo „Radio“ en u. Pazarĝik la esperantistoj celebris la veteranojn Ivan Vasilev (80-jara) kaj Kosta Konstantinov (70-jara). Ĉeestis gastoj el Plovdiv, Peŝtera, Ĥaskovo, Pârvo-maj, Ĥhtiman.

La prezidanto de „Radio“ N. Cârcarov mal-longe skizis la meritojn de ambaŭ jubileuloj.

Ivan Vasilev jam de junaĝo perlaboris sian panon kiel ŝtonĉizisto. Li lernis Esperanton en 1919 j. Depost 1924 li fariĝis membro de „Radio“, poste ties sekretario kaj multjare prezidanto. Grandaj estas la meritoj de Vasilev por la disvastigo de Esperanto kiel en la urbo, tiel en ĝia regiono. Ekde 1928 li estiĝis delegito de UEA en sia urbo. Vasilev vizitis UK de Esperanto en Budapeŝto (1929 kaj 1966), Varsovio kaj Sofio. Kiel reprezentanto de la bulgaraj pacamikoj li partoprenis la fondon de MEM en Aŭstrio en 1953 j.

Kosta Konstantinov naskiĝis en familio de instruisto. Dank'al sia patro li ekŝatis Esperanton. Kiel lernanto en la gimnazio de Sliven li studis la lingvon kaj komencis vastan korespondadon.

Dum kelkaj jaroj Konstantinov estis membro de DK de BEA en Pazarĝik kaj dum la lastaj — ties prezidanto. Li faris multon por la konstruo de societa klubejo en la urbo.

Reprezentantoj de E-societoj gratulis la jubileulojn kaj esprimis sinceran deziron vidi ilin ankoraŭ longatempe en la E-vicoj. Varme salutis ilin ankaŭ k-do Ĥristo Gorov — vicprezidanto de CK de BEA.

LA AGADO DE LA SOFIA E-SOCIETO „MAKSIM GORKIJ“

La nova estraro de la tuturba E-Societo „Maksim Gorkij“ en Sofia, elektita en la lasta jarkunveno frunte kun Ivan Keremidĉiev — Esperov, prezidanto, ellaboris vastan agadplanon, kiu sukcese efektiviĝas. Dum marto, aprilo kaj majo en la kunvenoj estis faritaj prelegoj pri la vivo kaj verkaro de M. Gorkij — patrono de la societo, fare de Ivan Draganov, la 100-jariĝo de la Aprila Ribelo en 1876 de prof. Vasil Ĉoĉov (partoprenis ĉiuj 10 sofiaj E-societoj), la 100-jariĝo de la pereco de la poeto-revoluciulo Ĥrŝto Botev kaj la pereintoj en la batalo por liberigo de nia lando el la osmana, faŝisma kaj kapitalisma jugoj — fare de Violin Oljanov. Tiuj aranĝoj estis akompanitaj de literaturmuzikaj programoj.

Estis okazigitaj ankaŭ prelegoj kun projekciado de diapozitivoj pri Egiptio kaj Palestino de Nikola Boĵilov. Pri la XI-a kongreso de BKP prelegis Iv. Keremidĉiev kaj la partopreninto en la kongreso kiel delegito Nikola Aleksiev — prezidanto de BEA.

La societo aranĝis ankaŭ funebran kunvenon kun riĉa programo dediĉe al la granda Kolomano Kalocsay.

Je la temo „La miraklo de la lingvo“ dufoje parolis Ljubomir Miĥajlov.

En du kunvenoj estis tuŝitaj sanproblemoj de d-ro Stefan Kadiev kaj V. Anastasov.

Laŭprograme ĉiun lastan merkredon de la monato estis prezentitaj „ĵurnaloj parolataj“, kiujn partoprenis pluraj societaj membroj.

Ĉiun monattrion okazis revuo de la E-gazetaro. Tian revuon nun faris Nano Nanov.

Granda grupo de niaj membroj partoprenis la E-renkontojn en Samokov — Borovec, Pazarĝik, Veliko Târnovo.

Sukcese finiĝis ankaŭ la E-kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

T. M.

Minko Conkovski



Diplomlaboraĵo pri Esperanto

„Esperanto kiel lingva realigo de la ideo de internacia lingvo“ — tio estis la temo de la diplomlaboraĵo de nia s-anino Nedjalka (Neli) Cankova, kiun ŝi defendis ne delonge en la Sofia Universitato ĉe la katedro de ĝenerala lingvistiko. Cankova estas instruistino en la fundamenta lernejo de v. Enina, distrikto de Stara Zagora, kie ŝi instruas ankaŭ Esperanton al lernantoj. En la Universitato ŝi studis foreste bulgaran filologion. Ĉe la defendo de sia verkaĵo ŝi ricevis la plej altan poenton.

Ni gratulas sincere nian fervoran samideanion kaj deziras al ŝi pluajn sukcesojn sur la Esperanto-kampo!

E-societo en Jakoruda

Post sufiĉe bona preparo en la malgranda montara urbeto Jakoruda estis fondita la unua E-Societo „Paco“. Kiel prezidanto estis elektita k-do Vladimir Gjoŝev. La fondon kunvenon partoprenis Marija Kojareva el Bansko — membro de CK de BEA kaj prezidantino de la E-societo en Bansko. Ŝi gratulis la kunvenon kaj bondeziris sukcesan laboron. Je la nomo de la urba komitato de BKP en Jakoruda la kunvenon salutis Georgi Cinev, kiu same bondeziris fruktodonan laboron al la nova societo kaj rapidan disvastiĝon de la E-movado en Jakoruda.

Vl. Gjoŝev

MEMORE AL KALOCSAY

La Sofia E-Societo „M. Gorkij“ okazigis kunvenon lige kun la forpaso de la eminenta hungara E-poeto Kolomano Kalocsay. La programon kunmetis kaj plenumis la Esperanta Literatura Rondo en Sofio. Reĝisoris Miŝo Zdravev, konata estrada kantisto.

Komence oni honoris la memoron de Kalocsay per unuminuta silento. Asen Grigorov parolis pri la vivo kaj la verkaro de la poeto. La kunvenon gvidis Rajna Arnaudova, kiu ankaŭ deklamis la versaĵon „Forpasis Kalocsay“ de A. Grigorov. Antaŭ la plenplena salono kaj en solena etoso verkojn de Kalocsay recitis jenaj gesamideanoj: Miĥail Ĉobanov („Lenin“), Ĵorĵeta Zdraveva („Mesaĝo de Nazim Hikmet“), Sabina Kovaĉeva („Zamenhofbalado“), Belka Beleva („Vizio sur la ponto“), Ginka Dilova („Tragedieto“), Cvetanka Abdulska (fragmentoj el „Maja idilio“), Stefan Kadiev („Alkemio“), Miŝo Zdravev („Mi amas vin“), Vera Vâjarova („Pri nia kor“), Penka Batoeva („Nigra rajdanto“).

Ĉe la fino nia elstara E-poeto Simeon M. Simeonov tralegis sian versaĵon — „Memore al Kalocsay“.

Ana Mindova

E-aktiveco en Drjanovo

En la ekonomiteknikumo en u. Drjanovo jam kvin jarojn funkcias E-rondo sub la gvido de la E-instruistino Elka Vâlkova. Dank' al ŝia obstina laboro formiĝis du grupoj po 25 gelernantoj, kiuj lernas Esperanton po 2 horoj semajne. Oni parkerumis versaĵojn, kantojn kaj prezentis ilin antaŭ la urba radio-reto. Pasintjare lige kun la 30-jariĝo de la venko super la faŝismo estis organizita internacia vespero, kiun ĉeestis ankaŭ sovetaj, francaj kaj germanaj grupoj. Multaj aliaj E-aranĝoj okazis.

Ĉi-jare membroj de nia grupo partoprenos tendar-lernejon en Ĉeĥoslovakio.

En nia teknikumo ekzistas vigla intereso al la internacia lingvo.

Rondanoj

E-kurso por medicinistoj en Ŝumen

Dum la ĵus pasinta lernoĵaro en Ŝumen funkciis E-kurso por komencantoj ĉe polikliniko. Ĝin gvidis la multjara E-instruistino Rajna Kasabova. Ĉiumarde post la labortago la kursanoj — kuracistoj, flegistinoj ka — kolektiĝis kaj diligente lernis. Tre bonajn sukcesojn jam havas doktoroj Ljudmil Conov, Ivanka Marinova kaj Balev, la flegistinoj Ruska Todorova, Antonia Conova ka.

La kurso finiĝis per ekzameno por la I-a grado. La novaj e-stoj deziras membri en la Medicina Sekcio de BEA.

Petranka Ilkova

AGRABLA VESPERO

La Poŝtista E-Societo „Heroldo“ en Sofio havas riĉan vivon. La estraro preparas programon pri niaj semajnaj renkontiĝoj. Ekzemple iu legas aŭ recitas siajn verkojn, alia projekcias diapozitivojn el fremdlandaj ekskursoj. Ofte ni havas politikan informadon, referaton, gajan renkontiĝon, ekskurson, gastigadon ktp.

Foje multe da membroj kolektiĝis por iri al restoracio „Sveĵest“, kiu troviĝas ĉe la piedoj de Vitoŝa. La monto sendis al ni sian freŝan aeron per ventoblovo kiel tenera kareso. Ĉiuj ni estis bonhumoraj kaj ĝojaj.

Ni vespermanĝis kun granda apetito, ofte ŝercante unu kun la alia.

Similaj vesperoj bone helpas por la interproksimiĝo de la membroj.

Nadja Ĵejnova



EL LA SALUTPAROLADO DE N. ALEKSIEV — PREZIDANTO DE BEA, AL LA XII KONGRESO DE LA BULGARAJ FILATELISTOJ

Inter la esperantistoj la filatelo kaj la kolektado estas tre popularaj.

Ĉe naciaj E-kongresoj la bulgaraj e-stoj interkonsente kun la Asocio de la Bulgaraj Filatelitoj aranĝas filatelajn ekspoziciojn. Nun tia ekspozicio estas aranĝota en Ruse, kie post unu monato okazos la 39 nacia E-kongreso. En 1978 en Varna okazos la 63-a Universala Kongreso de Esperanto. Mi esperas, ke la bulgaraj esperantistoj-filatelitoj denove plenumos sian patriotan kaj internacian devon.

Inter la esperantistoj-filatelitoj aktive laboras la klubo „Amika Rondo“, fondita en 1963 kiel sekcio de la Bulgara Esperantista Asocio. Ĝi ĝisvolvas sian agadon sub la protekto de ambaŭ asocioj — la Esperantista kaj la Filatelita, kiuj subskribis specialan interkonsenton por komuna agado.

La klubo „Amika Rondo“ unuigas la e-stojn en organizaĵo, kiu havas la jenajn celojn:

1. Per la kolektado helpas la batalon por

paco, amikeco, reciproka konatiĝo kaj kompreniĝo inter la popoloj, sendepende de ilia socia kaj ekonomia ordo.

2. Helpas la kolektadon de Esperantaj kaj filatelaj materialoj.

3. Faciligas siajn membrojn havigi al si filatelajn materialojn.

4. Propagandas inter la filatelitoj la lernadon kaj uzadon de la internacia lingvo Esperanto.

En la klubo estas organizitaj pli ol 200 bulgaraj kaj ĉ. 100 eksterlandaj (helpaj) filatelitoj. Ĝi eldonas sian esperantlingvan bultenon „Kolektanto“, aranĝas organizajn kaj kultur-klerigajn kunvenojn kun prelegoj je filatelaj temoj k. a.

Mi estas certa, ke ankaŭ estonte e-stoj kaj filatelitoj fruktodone kunlaboros por la bono de nia socialisma patrolando.

Al novaj sukcesoj!

VOJO TRA LA JAROJ

En Ŝumen okazis solenaĵo dediĉita al la 70-jara jubileo de la aktiva socia kaj kultura aganto, ĵurnalistoj kaj prezidanto de DK de BEA Atanas Bojaĝiev. Al la jubileulo estis enmanigitaj memoraĵoj kaj salutadresoj. Li ricevis gratulleterojn kaj telegramojn. Pri lia E-agado estis diritaj multaj dankvortoj.

Atanas Bojaĝiev estas jam 70-jara, sed oni malfacile povas trovi lin hejme. Li konstante estas okupata per socia laboro. Bojaĝiev kun junula energio fordonas siajn fortojn al E-Societo „Vekiĝo“, al la kvartala organizaĵo de la Patrolanda Fronto, al UK de la Ŝtatkontrolado, al la pacmovado ka. Kaj kiam oni renkontas lin aŭ aŭdas lian paroladon, ŝajnas, ke li ĉiam estas juna.

Li estas naskita la 13-an de majo 1906 en u. Omurtag, kie li lernis ĝis la fino de la gimnazio. En 1927 li finis sukcese la pedagogian instituton en Ŝumen, kie lia samstudento estis la fama partizana taĉmentestro kaj esperantisto Diĉo Petrov. Poste li estis instruisto en v. Ilijno, regiono de Omurtag. En 1935 oni eksigis lin pro lia progresema agado. Jaron kaj duonon li estis senlabora, poste kvar jarojn laboris en arbarprodukta kooperativo en Rodopi-montaro. Nova eksigo pro la samaj kaŭzoj. Kune kun sia familio li rondiris la landon por serĉi laboron kaj fine trovis ĝin en Kaspiĉan.

Venis la 9-a de septembro — la tempo por fruktodona, entuziasma laboro. Unue Bo-

jaĝiev estis lerneja inspektoro, poste laboris en la Distrikta Popola Soveto, en UK de BKP — Ŝumen kaj kiel ĉefredaktoro de la distrikta ĵurnalo, kie li estis pensiigita.

La vojo de lia vivo revenigas nin al la taĝoj de la unua en la mondo kontraŭfaŝisma ribelo en 1923 j., kiam Bojaĝiev estis studento en la instituto. La ribelo estis sufokita kruele, sed la batalo daŭris. La progresemaj studentoj membris en la akademia societo. Bojaĝiev organizis ekskursojn, legis referatojn. En tiu tempo ĉe la juna batalanto ekĝermis nova ŝato, kiu neniam estingiĝis — la internacia lingvo Esperanto.

Malriĉa estis la regiono de Omurtag, sed heroema; ĝia inteligentularo amis forte la popolon. En vilaĝo Ilijno la instruistoj estis veraj popolaj agantoj. Ili laboris en la legejo, kreis abstinulan societon, organizis vesperan



At. Bojaĝiev (dekstre) kaj lia gasto
M. Ohotin



lernejon por la vilaĝanoj kaj aktive partoprenis la agadon de la instruista profesia opozicio. Per E-to Bojaĝiev komencis korespondi kun gekolegoj el diversaj landoj. Plej interesa estis lia amikeco kun la soveta instruisto Mihail Ohotin, kies leteroj diris la veron pri la unua socialisma lando. Ohotin sendis la revuojn „Ogonjok“, „SSSR na strojke“ k. a. La plej interesajn materialojn Bojaĝiev tradukis en speciala kajero, por konigi ilin al instruistoj kaj vilaĝanoj. Tamen la policanoj eksciistion kaj malpermesis la korespondadon kun USSR. Tiam la sovetaĵoj kaj gazetoj denove estis ricevataj, sed ĉi-foje. . . tra Francio, resendis ilin la franca e-sto R. Brice. Dum la Lejpszig-Proceso dank'al tiu franca kama-

rado Bojaĝiev rakontis al la gekolegoj pri la giganta batalo de Georgi Dimitrov kontraŭ la faŝismo.

Ĉesigita pro la milito, la korespondado inter li kaj la soveta instruisto reviviĝis antaŭ kelkaj jaroj kaj pasintjare li venis kaj gastis al Bojaĝiev.

A. Bojaĝiev estas 70-jara, sed ankoraŭ plena de energio. Entuziasme laboras por Esperanto ne nur li, sed ankaŭ liaj edzino, bofilino, nepino — vera E-familio.

Ni bondeziras al li ankoraŭ longan vivon por labori kiel ĝis nun entuziasme por Esperanto, por la socialismo, por la paco!

Georgi Uzunski

LA UNUA BULGARA ESPERANTISTO

Miloslav St. Bogdanov estas sendube la unua bulgara esperantisto (vd. en „Bulgara Esperantisto“, 1974, n-ro 10—11, p. 28). Pro neglekto kaj subtakso de lia pionira agado oni konis nek la jaron, nek la lokon de liaj naskiĝo kaj morto. Apenaŭ en aprilo 1975 mi sukcesis trovi tutan dosieron kun dokumentoj kaj leteroj (el la periodo 1893—1898) pri kaj de li. Nun ni havas fidindajn materialojn, kiuj ĵetas fortan lumon sur la agadon, instruitecon kaj ĝenerale sur la personecon de la unua bulgara Esperanto-pioniro.

Bogdanov naskiĝis la 15-an de novembro 1868 en vilaĝo Groznatovci. Tre frue li restis orfo kaj devis tute sola ekde infanaĝo perlabori sian panon. En la jaro 1887 li redaktis ĵurnalon en Sofio. Tri monatojn antaŭ ol fariĝi 19-jaraĝa Bogdanov jam havis en siaj manoj la Unuan Libron de Esperanto (por rusoj). En daŭro de tri jaroj (ĝis la fino de 1890) li ricevis 17 leterojn de L. Zamenhof, 15 — de la irlanda lingvisto R. H. Geoghegan (antaŭ ties elmigro al Norda Ameriko) ktp.

Antaŭ la apero de Esperanto Bogdanov lernis Volapjupon. Tio helpis al li pli bone aprezi la kvalitojn de Esperanto. La juna Bogdanov fariĝis verva adepto de Esperanto kaj energie kontraŭstaris al Volapjuko. Tiurilate li agis

eĉ internaciskale. En 1890 Bogdanov delikate riproĉis la rusan esperantiston V. V. Mainov el Peterburgo, ke tiu lasta korespondas kun alia bulgaro en Volapjuko: „Mi kun plej granda plezuro tralegis viajn amindajn leterojn skribitajn en la internacia lingvo „Esperanto“, sed mi tralegiŝ (ankaŭ) vian leteron en la lingvo Volapjuko, senditan de vi al s-ro St. Dimitrov. . .“

En septembro-novembro 1889 Bogdanov aperigis en kvar ĵurnaloj kelkajn varbartikolojn. Rezulte de tio fondiĝis en oktobro la saman jaron „Klubo Esperantista de Sofio“, ofte nomata „Centra Klubo Esperantista en Sofio“, ĉar ĝi provizore varbadis tra la tuta lando. En decembro li fondis gazeton „La Mondlingvisto“ kaj sinsekve aperigis numerojn 1 kaj 2. En januaro 1890 aperis la n-ro 3 (lasta) kaj tuj poste la unua Esperanto-lernolibro por bulgaroj, verkita de li.

En la printempo de 1891 Bogdanov fondis la unuan landan oficialan organizaĵon — Esperanto-Societon „Espero“ en Sofio, kies 10-paragrafa statuto aperis la saman jaron paralele en bulgara kaj en Esperanto. La presorgano de tiu societo estis „La Espero“ — rekta daŭriganto de „Mondlingvisto“.

En la komenco de 1891 j. Bogdanov entreprenis longan vojaĝon tra Suda Bulgario. Dank' al tiu diversloka varb-



kampanjo E-Societo „Espero“ ekhavis 21 membrojn en 10 urboj kaj 1 vilaĝo. En la periodo 1891—1892 tra la tuta lando aktivis 45 esperantistoj en 15 urboj kaj 4 vilaĝoj.

Tiutempe M. Bogdanov havis intensan kontakton kun la esperantistoj en Rusio. Kaj kiam en Peterburgo oni finfine sukcesis ricevi oficialan permeson pri fondo de landa organizaĵo — Esperantista Societo „Espero“ en Peterburgo, al la fondkunveno venis nur unu gratulo el eksterlando — la telegramo de M. Bogdanov el Sofio. En la sama jaro li aperigis broŝuron pri iu socia problemo. La tiutempa socialdemokrata gazeto en Bulgario favore recenzis kaj rekomendis ĝin al la legantoj.

En la fino de 1892 M. S. Bogdanov pretigis priesperantan artikolserion, kiu ritme aperadis ekde la komenco de 1893 ĝis la komenco de 1894. Iom poste la serio aperis broŝurforme sub titolo «Vsemirno meĉtanie i bălgarskata pravopisna revoljucia» (La tutmonda revo kaj la bulgara ortografia reformo). Ĝi estis enskribita sub n-ro 69 en la Zamenhofa listo de E-literaturo.

En la aŭtuno de 1893 Bogdanov enskribiĝis en la jura fakultato de la Sofia Universitato. La 18-an de majo 1894 en la centro de Sofio okazis granda popolmitingo kontraŭ la registaro de Stefan Stambolov. Bogdanov estis unu el la plej aktivaj organizantoj de la mitingo. Efektive la malamata registaro estis renversita, sed li mem pagis tro altan prezon. Dum la interpuŝiĝo Bogdanov estis batita ĝismorte de siaj kontraŭuloj. Kun rompita kapo kaj tute trempita en la propra sango li apenaŭ sukcesis atingi sian loĝejon.

Ekde marto 1895 Bogdanov forveturis al Svislando (urboj Friburg kaj Genevo) kaj poste al Belgio (Antverpeno kaj Bruselo), kie li plue studis juron kaj en januaro 1898 doktoriĝis pri juraj sciencoj. Reveninte Bulgarion li fariĝis advokato en Sofio. En 1899

Bogdanov okupis postenon de notario en urbo Kjustendil, sed post nelonge estis invitita reveni Sofion por redakti ĵurnalon. La ofico de redaktoro ne daŭris multe. Bogdanov tamen restis en Sofio kaj daŭrigis tie sian laboron de advokato.

La advokata kontoro de Bogdanov, en la centro de Sofio, estis tiutempe la nura renkontejo por la nemultaj esperantistoj. Iufoje li aperigadis en la gazetoj inviton al la esperantistoj por renkontiĝo ordinare en difinita tago je la 18 horo en restoracio „Slavjanska Beseda“. El tiuj neoficialaj kunvenoj kaj iliaj pluaj propagando kaj E-instruado rezultis la restarigo de la Esperantista Klubo en Sofio sub la nomo „Aŭroro“ (la 22-an de novembro 1902). Bogdanov regule vizitadis la kunvenojn de la klubo kaj entuziasme partoprenis la diskutadon de la tagordaj problemoj.

En 1900 li estis elektita de la vic-kuracista societo kiel ĉefredaktoro de gazeto „Medicinski Feldŝer“. La unuaj numeroj aperis en 1901 sub lia redakto. Per siaj ĵurnaloj „Radikalo-Republikanec“ (Radikalo-Respublikano) de 1901 kaj „Balkanlanda Federacia Respubliko“ (1903, 1906), bulgarlingvaj, li pledis por unueca agado kun la Agrara Unuiĝo kaj kun la Socialdemokrata Partio. Bogdanov favore mencias la nomojn de iuj elstaraj socialdemokratoj: Georgi Kirkov, Vasil Kolarov, Nikola Gabrovski k. a. Kun ili li pretis kunlabori.

En la esperantista movado Bogdanov ne plu okupis gvidpostenon, sed li plue laboradis por Esperanto. Oni trovas lian adreson inter la adresoj de la sofiaj esperantistoj en la fama „Tutmonda Jarlibro Esperantista“ por la jaro 1904 (p. 60) kaj por la jaro 1906 (p. 82).

En «Alvoko al la Bulgaraj Esperantistoj» la redakcio de „Unua Paŝo“ alude rekonas lian kontribuon en la pasinteco: „Sed por ke Esperanto povu atingi la nunan staton, ĝi devis batali kaj forte batalis kontraŭ multnombraj digoj, kiuj malhelpis ĝian vojon. La ba-

talado estis longa kaj malfacila: oni devis esti kuraĝa por ĝin partopreni. En tiu ĉi batalado por la sukceso de Esperanto partoprenis kaj partoprenas diversnaciaj batalantoj. Ĝia areno estas la tuta mondo. *Ĉe ni ankaŭ de tre frua tempo Esperanto trovis fervorajn partianojn. Ili estis fortaj per la kredo en Esperanto kaj sindone laboradis por ĝia sukceso. Dank' al ili Bulgario nun havas multajn esperantistojn, kiuj siavice sindoneme disvastigas kaj antaŭenigas Esperanton.*"

Okaze de la 20-jara jubileo de Esperanto en 1907 la redakcio de la tiama „Bulgara Esperantisto“ parolante pri la meritoj de la plej malnovaj pioniroj de la bulgara E-movado konkrete mencias ok nomojn, inter kiuj ankaŭ la nomon de Miloslav Bogdanov (jk. I, n-ro 3 de majo-junio 1907, p. 4).

Post la Ido-krizo Bogdanov faris provon reformi Esperanton (1909), sed feliĉe li mem baldaŭ komprenis sian eraron. En „Esperantista Poŝkalendaro“

por la jaro 1910 sur p. 173 aperis kvar gravaj E-adresoj, inter kiuj la tria estas: „advokata kontoro de Bogdanov“. La lasta ago de Bogdanov por Esperanto estas lia entuziasma telegramo, kiun li sendis al la 4-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj en 1910.

Orfo plena ekde infanaĝo, malriĉulo, batita ĝismorte precipe sur la kapon en majo 1894, troŝargita de studado kaj samtempa laborado por gajni sian panon, fizike kaj psike turmentita fare de la ŝtatinstancoj ekde la jaro 1900, kiam li sentime kritikis la maljustaĵojn de la bulgara burĝa tribunalo, lia personeco ne eltenis. En 1903 aperis la unuaj simptomoj, ke li estas neŭroze malsana. Estas informoj en la gazetaro, ke lia malsaniĝo kreskis en 1909 kaj en 1911. Oni diras, ke li mortis en iu malsanulejo de Sofio en 1914.

Canko MURGIN

Hr. Iskrov

LI FALIS POR LA LIBERO

Ja kiu falas por la libero,
mortas neniam!

Hr. Botev



Sentante sin veraj internaciistoj la plejparto de la bulgaraj esperantistoj neis la naciismon kaj la faŝismon, kiuj kiel pesto infektis milionojn. Al la veraj patriotoj kaj internaciistoj apartenis ankaŭ Rajĉo Kirkov.

Naskita en malriĉa kamparana familio en 1906 en vilaĝo Dragojnov, regiono de Pârvomaj, Rajĉo juna forlasis la patran domon por serĉi laboron en la proksima urbo Asenovgrad. En ties tabakmanufakturoj oni dungis lin kiel novicon. Ĉar la tabakindustrio funkciis sezone, dum la vintraj mo-

natoj Rajĉo dediĉis sin al lernado de lingvoj kaj studo de marksisma literaturo. La sperta esperantisto kaj tabaklaboristo Aso Pavlov agitis lin pri Esperanto kaj li aliĝis al E-kurso por laboristoj.

Rajĉo rapide ekposedis la lingvon kaj komencis viglan korespondadon kun fremdlandaj esperantistoj. Dank' al Esperanto antaŭ liaj okuloj malkovriĝis vasta mondo. Li eksciis, pri kio luktas la laboristoj en Germanio, Francio, Anglio kaj malproksima Japanio. Aparte lin interesis la konstruado de



nova socio en Sovetunio. Al lia adreso venadis gazetoj kaj libroj el la tuta mondo.

En la medio de klaskonsciaj laboristoj Rajĉo formis al si prijuĝon pri la reganta reakcia klaso kaj partoprenis la fondon de junlaborista societo, kiu havis la celon eduki la junajn laboristojn en la ideologio de marksismo-leninismo. El tiuj unuopaj societoj poste naskiĝis la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS).

Dum festotagoj la junaj laboristoj, organizitaj en la vicoj de RMS, ekskursis al pitoreskaj anguloj de Rodopi-montaro kaj tie pasigis la tempon, legante progresemaĵojn ĵurnalojn, deklamante versaĵojn de revoluciaj poetoj, dancante kaj ludante sur la verdaj tapiŝoj de la herbejoj. Rajĉo estis la animo de la montaj promenadoj.

Plovdiv, granda laborista centro, citadelo de la komunista movado, allogis lin kaj en 1928 li translokiĝis tien. Li estis bonvena por la plovdivaj laboristaj rondoj. Iuj gvidantoj de la Laborista Partio rimarkis lian aktivecon kaj inteligentecon kaj varbis lin al la organizaĵo. Oni komisiis al li organizi strikon en la labordeponejo, kie li laboris. Li sukcesis en tiu rilato kaj en junio 1929 kelkcentoj da laboristoj eliris sur la straton. Samtempe deklaris strikon dekoj da entreprenoj. La ekzemplon de la plovdivaj tabaklaboristoj sekvis kolegoj en Asenovgrad, Ĥaskovo kaj en aliaj urboj. „Plialtigo de la salajroj!“ — tio estis la ĉefa devizo de la strikantoj.

La polico tuj ekstaris ĉe la flanko de la fabrikestroj kaj kruele batis la gvidantojn de la striko. Rajĉo ankaŭ estis persekutata kiel membro de strik-komitato. Por eviti la turmentojn li kaŝis sin de la spionaj okuloj kaj serĉis azilon en najbara Jugoslavio. Dum du jaroj li mizerumis en tiu lando kaj revenis nur post amnestio.

Denove li fariĝis tabaklaboristo. Samtempe li verkadis artikolojn por la laborista gazetaro, en kiuj priskribis

la staton de la laborista klaso. Tio estis atesto pri lia redaktkapablo kaj DK de la Laborista Partio enoficigis lin kiel ĉefredaktoron de ĵurnalo „Ĥo de Plovdiv“. Sub lia redakto aperis kelkaj numeroj, vipantaj la ekspluatistojn kaj reakciulojn en Suda Bulgario. Tio estis trafa preteksto, por ke la lupo formanĝu la ŝafon. La distrikta prokuroro konstatis, ke la ĵurnalo faras propogandon pri perforta ŝanĝo de la burĝa reĝimo kaj akuzis lin. Rajĉo defendis sin antaŭ la faŝista tribunalo deklarante, ke ankaŭ la laborista klaso havas la rajton eldoni ĵurnalojn. La tribunalo tamen deklaris lin kulpa kaj difinis severan punon. Sep jarojn Rajĉo devis pasigi en diversaj prizonoj. Tie li dediĉis sin al memklerigado kaj perfektigado en Esperanto.

Kiam oni liberigis lin, komencigis la Dua Mondmilito: Hitler subigis Aŭstrion kaj dispecigis Ĉenoslovakion. Lia monstra militmaŝino invadis Pollandon. Poste sekvis atako al okcidentaj ŝtatoj. „Baldaŭ estos milito kontraŭ Sovetunio“ — parolis Rajĉo kaj dediĉis sin al kreo de amasa organizo kontraŭ faŝismo kaj milito. Li revenis en la vicojn de la tabaklaboristoj kaj eklaboris por nova striko — kontraŭ ekspluatistoj kaj spekulantoj, kiuj intence altigis la prezojn de la nutraĵoj. Denove eksplodis striko sub la devizo: „Panon kaj pacon!“ Rajĉo estis unu el ĝiaj organizantoj. Iom post iom la striko akceptis politikan karakteron kun la slogano; „Pakton pri amikeco kun Sovetunio!“

Tamen la bulgara monarko kaj liaj ministroj sekrete ekstaris ĉe la flanko de Hitler kaj en marto 1941 oficiale aligis nian landon al la akso „Berlino — Romo — Tokio“. Tiamaniere nia lando falis en la manojn de hitleranoj. Elitaj germanaj trupoj okupis niajn havenojn, aerodromojn kaj atakis la najbarajn Grekion kaj Jugoslavion. Post tio la militmaŝino de Hitler direktiĝis al Sovetunio.

La Bulgara Laborista Partio deklaris sian solidarecon kun la soveta popolo kaj alpaŝis al organizado de sabotgrupoj kaj partizanaĵoj taĉmentoj. Rajĉo estis difinita kiel instrukciano de DK de la Laborista Partio pri la bataltruoj. Li varbadis partizanojn kaj inspektis partizantaĉmentojn en Rodopimontaro kaj Sredna Gora. Tie, en la gerilaj bivakoj li renkontis esperantistojn kaj havigis al ili E-librojn. Rajĉo instigis ilin gvidi kursojn por la partizanoj dum la liberaj horoj, ĉar post la milito kreskos la intereso al la Internacia Lingvo.

Lia profetaĵo parte realiĝis sed bedaŭrinde li ne povis ĝui kaj partopreni la revigliĝon de la Esperanto-movado kaj la strebado de la popoloj al paca kunvivado. Je la 16-a de junio, kiam la brava Ruĝa Armeo venke marŝis al Meza Eŭropo kaj al la Balkana Duoninsulo, Rajĉo ekiris inspekti la taĉmenton „Ĥristo Botev“ en Sredna Gora. Ĉe la suda periferio de Plovdiv li ne sukcesis eviti faŝistan embuskon. Oni vundis lin je la kruro, kaj por ne fali viva en la manojn de la malamiko li direktis la pistolon al sia koro. . .

Nun liaj korprestaĵoj ripozas en impona maŭzoleo kune kun la restaĵoj de dekoj da esperantistoj, falintaj kiel herooj en la batalo por paco kaj libereco, por konstruo de nova socio — sen ekspluatistoj kaj ŝovinistoj.

TRA LA E★ MONDO

Esperanto-komponisto

En la ukraina urbo Vorŝilovgrad loĝas kaj verkas la komponisto Gurij Sergejeviĉ Arĥangelskij. Li samtempe gvidas E-kursojn por la junularo en sia urbo.

Arĥangelskij verkis ĉirkaŭ 20 komponaĵojn, dediĉitajn al la paco, al sia patrolando Sovetunio kaj al la Internacia Jaro de la Virino. Tre ofte aŭtoroj de liaj kantoj, romanoj kaj simfonioj estas famaj virinoj-esperantistinoj de Sovetunio. Inter ili estas la mondkonata infana E-poetino Ljudmila Jevsejeva el Riga, la vaste konta aktorino de „Mosfilm“ kaj poetino Antonina Tonĉi el Moskvo, la magistrino de la arto Ekaterina Majburova, docentino en la konservatorio „P. I. Ĉajkovskij“ en Kiev, k. a.

Multaj verkoj de Gurij Arĥangelskij estas komponitaj por infanoj laŭ tekstoj de L. Jevsejeva

Por la oktobra festotago la komponisto-esperantisto preparis muzikon por miksitahoro kun orkestro „Leningrado, la lulilo de Oktobro“ — laŭ versaĵo de Tonĉi.

Laŭ la soveta E-revuoj „Amikeco“

Koncizaj novaĵoj

La parlamento de Santa Fe (provinco de Argentino) aprobis leĝon, per kiu en la lernejakalendaro oni starigas la 14-an de aprilo kiel Tagon de Esperanto. Per la sama leĝo oni enkondukas Esperanton kiel studobjekton en du lernejojn: unu en Santa Fe (turbo) kaj unu en Rosario. Per tio ĉi Santa Fe fariĝis la unua argentina provinco, kiu aprobis leĝon pri la Internacia Lingvo en la lando.

Laŭ „La fornistro“ 4/1976

La prezoj de la E-kursoj en Norvegio iĝis malpli altaj ol en la pasintaj jaroj: ekde la 1 de julio 1975 la ŝtato donas subvenciojn al la lernantoj kaj en la ĉeestaj kaj en la korrespondaj kursoj de Esperanto.

Laŭ „Norvega Esperantisto“, 4/1975

La konata brazila filmreĝisoro Lima Barreto preparas longdaŭran filmon en portugala lingvo kun varianto en Esperanto.

La nova filmo „Inocencia“ estas jam la tria longdaŭra esperantlingva filmo de Barreto.

Laŭ „Brazila Esperantisto“, 78/1975



La Monga Federacio de la Sciencaj Laboristoj (MFSL) unuigas 33 naciajn asociojn el 28 landoj kun pli ol 200 000 membroj kaj kun multaj membroj-korespondantoj en aliaj 28 landoj. Ĝi estas fondita en 1946 laŭ iniciato de la mondfamaj sciencistoj: profesoroj Frederic Joliot-Curie kaj Paul Langevin el Francujo, John Bernal kaj Cecil Powell el Britujo — ĉiuj laŭreatoj de Nobel-premioj. Ĝia unua prezidanto, ĝis sia forpaso, estis Frederic Joliot-Curie. Hodiaŭ la funkcion de prezidanto de la Federacio plenumas la fama angla sciencisto prof. Fric Burhor, laŭreato de Nobel-premio, kaj la funkciojn de vicprezidantoj: I. I. Artobelevskij (Sovetunio), akademiano Kiril Bratanov (Bulgario), prof. K. Witzberger (Germana Demokratia Respubliko) kaj d-ro Husain Zahir, forpasinta en januaro 1976 (Hinda Unio), ĝenerala sekretario estas prof. Pierre Briquard (Francujo).

MFSL ricevis de Unesco statuson de konsulta organizaĵo en la kategorio A. Tre multaj organizaĵoj posedas tian statuson. Depost kelkaj jaroj la reprezentantoj de la Federacio partoprenas kiel aktivaj membroj en la internacia komisiono de la neregistritaj organizaĵoj ĉe la Unuiĝintaj Nacioj por la problemoj de la malarmado en Ĝenevo. En la nuna danĝera epoko por la homaro MFSL unuigas la penadojn de la intelektuloj el la tuta mondo por sekurigi la pacon, kulturan kaj ekonomian kunlaboradon inter ĉiuj popoloj de nia planedo. Pro sia pacama karaktero kaj agado ĝi ĝuas grandan internacian aŭtoritaton kaj prestiĝon. La oficialaj lingvoj, en kiuj la Federacio aperigas sian presorganon kaj siajn dokumentojn, estas kvar: angla, franca, germana kaj rusa. En sia lasta kunsido la Plenuma Konsilio de la Federacio decidis adopti Esperanton kiel kvinan lingvon por sia presorgano kaj komisiis al la Asocio de la sciencaj laboristoj en Bulgarujo la taskon pri ĝia apelo. Tio ĉi estas preskaŭ oficiala rekono de

la Internacia Lingvo fare de tiom alta sciencinstanco. Ĝi certe havos reefikon sur aliajn sciencajn unuiĝojn kaj sociajn movadojn. Sed pli grava ankoraŭ estas la enpenetro kaj enradikiĝo de Esperanto ĉiam pli kaj pli profunden en la vivo de la scienco, en la praktika profesia laboro kaj en la internacia kunlaborado de la sciencistoj. Tiamaniere nia lingvo komencas gajni terenon en gravaj sociaj tavoloj, trude de *malsupre*, malgraŭ la paŭtado de la oficialaj (ŝtataj) instancoj... Tio ĉi estas vojo al la venko.

Akceptinte la komisiitan taskon, la Prezidio de la Bulgara Asocio de la Sciencistoj asignis la necesan subvencion por eldonelspezoj. La revuo aperados kvarfoje en la jaro sur 32 paĝoj. Ĝi enhavos artikolojn kaj komunikojn de mondfamaj sciencistoj, kiuj sian materialon ne pritraktos el mallarge faka vidpunkto, sed popularscience okupiĝos pri ĝeneralaj kaj aktualaj problemoj de komuna intereso. La statuto de la Federacio difinas la ĝeneralan linion de ĝia presorgano. La jara abonkotizo de la Esperanta eldono de *Scienca Mondo* estas unusona dolaro por la okcidentaj landoj kaj unu soveta rublo aŭ bulgara levo por la orienteŭropaj landoj. Tiun ĉi ridinde malaltan prezon ebligis la subvencio de la Bulgara Asocio de la Sciencistoj, kies prezidanto, akademiano Bratanov, vicprezidanto de la Federacio, aktive favoras Esperanton.

La adopto de Esperanto fare de MFSL malfermas novan paĝon en la historio de nia Movado. La esperantistoj devas fari ĉion, kio dependas de ili, por disvastigi la revuon en sciencaj kaj aliaj intelektaj, ankaŭ neesperantistaj rondoj.

La sciencistoj donis la ekzemplon. Nun estas la vico de la aliaj grandaj profesiaj organizaĵoj.

Prof. d-ro St. Ĝuĝev
El „*Esperanto*“, 4/1976

Ni recenzas

SOVETA LINGVISTO PRI ESPERANTO

Ĉiam pli ofte lastatempe la sovetaj lingvosciencistoj okupas sin pri la problemoj de la internacia aŭ monda lingvo¹. Pritraktante tiujn problemojn ili neeviteble tuŝas ankaŭ Esperanton kaj esprimas sian pozicion al ĝi. Kiel sciate, iuj el ili, kiel la bone konataj al la tutmonda esperantistaro forpasinta profesoro E. A. Bokarĵov kaj d-ro M. I. Isaev, gvidanto

de la Interlingvistika grupo ĉe la lingvosciencia Instituto de la Akademio de Sciencoj de USSR, havas tute pozitivan rilaton al Esperanto. Aliaj, male, okupas negativan pozicion al ĝi. Estas, tamen, triaj, kiuj rilatas favore al Esperanto, sed trovas ĝin ne tute perfekta. Al tiu ĉi lasta kategorio apartenas Eduard Vartanjan, aŭtoro de la libroj „El la vivo de

la vortoj“ kaj „La naskiĝo de la vorto“.

Lia lasta ruslingva „Vojaĝo en la vorton“² estas tre alloga popularscienca lingvistika libro pri la lingvo kaj pri tio, kiel aperis la vortoj kaj la nacioj. Ĝi estas destinita por junuloj de la meza kaj supera lernejoj. La aŭtoro dediĉas la lastan ĉapitron de sia libro al la problemoj de la mondlingvo kaj esprimas sian rilaton al Esperanto, karakterizante ĝin sufiĉe detale. La ĉapitro estas titolita „Komuna lingvo de la terloĝantoj?“.

E. Vartanjan komencas la pritrakton de la problemoj pri la mondlingvo ekde la biblia legendo pri la mikso de la lingvoj fare de la Eternulo kiel puno pro la deziro de la homoj konstrui turon altan ĝis la ĉielo. Jam tiu legendo atestas la revon de la antikvaj popoloj pri komuna mondlingvo. Poste la aŭtoro revuas plurajn projektojn da mondlingvoj, montrante kiel ties esencan difekton la fakton, ke ili estas orientitaj al la homoj de la okcidenta mondo. Tio laŭ li, faras malfacila la ekposedon de tia lingvo fare de la loĝantoj de la oriento. Tiu ĉi opinio evidente estas neakceptebla, ĉar tiuj lastaj sukcese lernas kaj uzas plurajn eŭropajn lingvojn. La aŭtoro rilatas pozitive al la ideo pri artefarita monda lingvo kiel perilo inter la popoloj, ĉar ĝi donos avantaĝojn al neniua nacio. El la artefaritaj mondlingvoj li pritraktas pli detale nur du — Volapjuk kaj Esperanto. Komparante ilin li substrekas, ke „Esperanto sukcesis distingiĝi de Volapjuk ne nur per pli da logikeco, konsekvenco kaj simpleco de la gramatiko, kiu ne konas esceptojn, sed antaŭ ĉio per la leksiko de sia vortaro“.

Plue la sciencisto, citante eldirojn de L. Tolstoj, Bauduin de Courtenay (Boduen de Kurtenne) kaj de M. Gorkij pri Esperanto, indikas, ke „hodiaŭ dank’ al la penado de entuziasmuloj Esperanto kolektas sub siajn standardojn ĉiam pli kaj pli da novaj grupoj de homoj“.

La esencan kaŭzon de la vivkapablo de Esperanto E. Vartanjan vidas en ĝia neŭtraleco, en la fakto, ke same kiel la antikva greka lingvo kaj la latino ĝi estas „nenies“ kaj „ĉies“, nur konsiderinde pli simpla por ekposedo kaj uzado.

La aŭtoro korekte emfazas, ke „ĉiuj avantaĝoj de simila artefarita lingvo povos manifestiĝi, se la ŝtatoj, la internaciaj organizaĵoj elektus ĝin kiel internacian, se ĝi ĉie estus rekomendata por lernado en la lernejoj, se en la gazetaj kioskoj kaj en la librovendejoj oni povus trovi periodaĵojn kaj sciencoteknikan literaturon en Esperanto“.

E. Vartanjan tamen subtaksas la eblecojn de Esperanto esti uzata en la beletra kaj la poezia. Li opinias, ke Esperanto cedas al la disvolviĝintaj naciaj lingvoj rilate la eblecon esprimi nuancojn de pensoj kaj sentoj. Li ignoras la neceson pri uzado de internacia lingvo por poezio kaj beletra kaj rigardas tian lingvon nur rimedo por interŝanĝo de informoj inter homoj el diversaj lingvaj familioj.

Neniu lingvo, inkluzive la artefarita, tamen povas vivi sen beletra kaj poezio. Tion tre bone konsciis la kreinto de Esperanto d-ro L. L. Zamehof kaj pro tio li, kiel bilde diris la granda Esperanto-poeto K. Kalocsay, fianĉigis Esperanton, tuj post ĝia naskiĝo, al la poezio. „Li sciis, ke nur la poezio povas enspiri vivon en la argilfiguron de la verko, nur ĝi povas fari el grizaj vortoj, enuaj reguloj, sekaj skemoj vere vivan estaĵon, en kiu oni mire rimarkas la pulsbaton de l’vivo. Kaj vere, oni povas diri, ke ne per Esperanto li faris poezion, sed per la poezio li faris Esperanton. Oni povas diri, ke la tuta Esperanto estas poezia lingvo“.

Certe la aserto de Vartanjan pri la limigitaj eblecoj de Esperanto esprimi la nuancojn de pensoj kaj sentoj ŝuldiĝas al nekono de la originala kaj traduka beletra kaj poezio en tiu lingvo. Al tia aserto ni ne povas ne kontraŭstarigi la eldiron pri Esperanto de la fama bulgara filozofo, verkisto, literatura kritikisto kaj eksprezidanto de la Bulgara Akademio de Sciencoj Todor Pavlov:

„La novelon de Elin Pelin „La familio Gerak“ mi ne estis leginta en la originalo ka. unuafoje mi tralegis ĝin en Esperanta traduko. Preskaŭ nenio el la arta valorado de tiu bela verko de la talenta beletristo estis perdiĝinta en ĝia traduko. Mi englutis kaj travivis la enhavon de la libro, kvazaŭ tio estis la originalo mem. Tio solvis por mi definitive la problemon: se Esperanto povas transdoni, sen malvivigi, ilin, verkojn kiel „La familio Gerak“ (poste mi legis bonajn tradukojn el Botev kaj hodiaŭ el Smirnenski), tio signifas, ke ĝi ne estas malviva lingvo, ke ĝi vivas — kaj devas vivi, se krom tio ĝi estas tiom facilula por ellernado“³.

Parolante pri la lingva situacio en UNO kaj en la internaciaj kongresoj la aŭtoro konkludas, ke en la internaciaj forumoj en Eŭropo Esperanto, kreita surbaze de la eŭropaj lingvoj, povus fariĝi plena universala rimedo de komunikado.

En la fino de la ĉapitro E. Vartanjan donas koncizan gramatikon kaj vortareton.

Malgraŭ la kritikaj rimarkoj rilate Esperanton la aŭtoro, per la enkorpiĝo de ĉapitro pri la Internacia Lingvo en tiaspeca libro, ebligas al siaj multnombraj junaj legantoj konatiĝi kun Esperanto.


D. Haĝiev

¹ Pri detalaĵoj tiurilate vidu la artikolon de d-ro M. J. Isaev „Pri la bazaj metodikaj problemoj de la interlingvistiko“, publikita en „Bulgara Esperantisto“ — 1975.

² „Putešestvie v slovo“, Moskvo, 1975, 190 paĝoj, eldonkvanto 100 000.

³ El la libro „Pri la Internacia Lingvo dum jarcentoj“, Isaj Dratwer, 1970, p. 29—30.





Ivan Vazov

LA KARAVANO

En la dezerto pasas karavano.
De malproksima land' ĝi venas
kaj rampas for tra l'sabla oceano,
soifas pro l'varmegoj, longe penas.
Ekfuriozas la samum' infera.
La karavano haltas, ĝis foriras
la sabla ond' sufoka kaj danĝera —
kaj ree ĝi antaŭeniras.

Ekmarŝas ree tuj la karavano
laŭ sia voj' senfina, malfacila
tra l'dunoj de la sabla oceano.
Sed ĝi denove haltas, maltrankvila :
leona muĝ'... La karavan' ne malesperas,
en sangan lukton brave ĝi eniras.
La best' vundita fuĝas, urĝe malaperas —
la karavano plu ekiras.

Sentime marŝas ĝi kuraĝigita,
sed haltas ree : ĉe la horizonto
jen estas ĝia voj' supersutita
de blovsternita alta sablomonto.
La karavano erarvagas, pene provas
trabori al si vojon, fortojn reakiras
ĝis fine la direkton ĝustan trovas —
kaj ree ĝi antaŭeniras.

Turmentas ĝin soifo. Kaj de la miraĝoj
ĝi ofte estas delogata kaj trompata.
Kruele ĝin atakas hordoj plej sovaĝaj ;
de malfeliĉoj estas ĝi trafata,
sed marŝas plu al novaj horizontoj ;
al novaj akcidentoj brave iras ;
viktimojn lasas sur la sablomontoj —
kaj ree ĝi antaŭeniras.

Kaj ĉiam vigla, marŝas ĝi senlaca ;
jarcentojn multajn marŝas ĝi sen ĉeso.
Kaj tiun karavanon sur la vojo paca
delonge oni nomas ĝin Progreso.
Ĝin ne timigas la viktimoj multaj —
de nobla cel' spirito homa sin inspiras ;
ne devojigas ĝin la erarigoj kultaj, —
kaj ĉiam ĝi antaŭeniras.

Antaŭeniras karavan' el ĉiuj rasoj,
strebante al justeco kaj al lumo ;
traboras vojon tra sennombraj embaraso
batalas brave kontraŭ la mallumo,
sed malantaŭen ĝi neniam iras
kaj kontraŭ la tenebroj* ĉiam en milito,
rapide aŭ rampante, ĝi antaŭeniras —
la Karavano de l'Spirito.

Sofia, 1899

* Tenebro — profunda mallumo.

El la bulgara : Simeon M. Simeonov

Mladen Isaev

ADORKLINIĜO

La vivo estas fenomen' mirakla.
Kliniĝas mi ĉe ĝia luma pomp'.
Mi estas floro de la arb' smeralda
kaj guto de la varma tera font'.

Min ravas la flugado de la falko,
de l'akvoj blankaj kaj de l'varma vent',
de la nubaro en printemkobalto,
la lumo hela sur la firmament'.

Allogas min enigmoj nesolvitaj,
ankoraŭ vualitaj en mister' —
en la profundoj kosmaj infinitaj
kaj en la sinoj de la varma ter'.

Enkaptas min kaj ĝoj' kaj timo ia
pri via sorto, mia tera mond'.
Mi volus povi ĉe tempesto ĉia
vin gardi viva, juna por estont'.

Fariĝu peza pro homan' la tero
samkiel vaksĉelaro pro miel',
kaj rondflugadu sola en libero
la birdo de la ĝojo en ĉiel'...

La vivo estas fenomen' mirakla.
Kliniĝas mi ĉe ĝia luma pomp'
Ho, lumu hele, mia ter' smeralda,
kaj spiru la ŝprucanta tera font'.

El la bulgara : Dimitro Haĝiev

ĈE LA ŜTONEGO

Li staris sur la ligna podio kun aliaj personoj; estis alta, grandstatura, jam senhara viro, ankoraŭ ne rompita de la jaroj. Pro la varma vetero li estis formetinta sian jakon. Miloĵoj da homoj — viroj, virinoj, junuloj, infanoj, aŭskultis lian paroladon. Ofeliite — la vasta dekliva herbejo, sur kiu la homamaso sidis, prezentis bonegan naturan amfiteatron. La mikrofono laŭtigis la voĉon de la parolanto, kaj al li ŝajnis, ke ne nur la homoj, sed ankoraŭ la verdaj piceoj ĉirkaŭe, la tuta monto aŭskultas lin...

Antaŭ duonjarcento la monto donis al li kaj al liaj kamaradoj sekuran rifuĝejon. Estis same kiel nun maja tago, sed tiam pluvetis. El diversaj lokoj de la lando ili venis en la koron de Vitoŝa-monto por pridiskuti, kiel daŭrigi la batalon. Ili estis fortaj, spertaj kaj bravaj viroj, restintaj vivaj post la frakaso de la Septembra Ribelo.

Kiam la parolanto finis siajn rememorojn, oni ŝtorme aplaudis. Kelkaj ruĝaj standardoj ŝanceliĝis. Per tio finiĝis la oficiala parto de la programo.

Sekvis popola amuzo. El tornistroj kaj sakoj la homoj eligis manĝaĵojn kaj sur la verda herbo kun apetito ekmaĝis. Sur la podio okupis lokon muzikistoj. Ili ekludis, kaj la vigla kaj gaja melodio instigis al rondodancoj.

Malsupreniĝinte de la podio la parolanto ekiris, sed ne al la ŝoseo, kie lin atendis aŭto. Iu blondhara junulo atingis kaj haltigis lin.

— Oĉjo Kosta... kien?...

— Ĉu vi pensas, ke mi revenos sen vidi la ŝtonegon?!

— Mi komprenas vin... Sed ĉu ne sufiĉas, ke vi venis al tia alto por paroli al la kunveno? Vi estas jam laca. Via sanstato...

— Mi nepre iros. Eble tio estos por la lasta fojo.

La sulkoj de la bruna frunto kuntiriĝis pro emocio.

— En tiu okazo, — diris decide la junulo, — mi akompanos vin.

— Ho, lasu min sola... Tiel... sen protektantoj.

La voĉo de la maljuna viro ektramis pro neretenebla incito.

Apogante sin sur la bastono, tenante la jakon en sia maldekstra mano, li malrapide ekpaŝis laŭ la oportuna ebena vojeto, atingis la lingnan ponteton, sub kiu ŝaŭmis kristalklara montara torenteto. Ne malproksime inter la sveltaj trunkoj de la pinoj, li vidis la ŝtonan kapon de Rakovski. Grave malsana, la granda revoluciulo el la pasinta jarcento ĝis la fino de sia vivo ne ĉesis batali. Pensante pri tio, la viro eksentis en si la iaman forton kaj memcertecon kaj ekpaŝis energie, sed kiam la vojeto iom post iom plialtiĝis, la frapoj de lia lacigita koro komencis resoni en la oreloj kaj devigis lin halti ĉe la loko, kie la vojeto disduiĝas. „Ankoraŭ iomete!“ — li ekspiris kaj post mallonga ripozo ekiris dekstren. Ĉi tie la vojeto mallarĝiĝis kaj estiĝis preskaŭ kruta. Feliĉe, la distanco ĝis la historia loko ne estis longa. Tie troviĝis belega herbejo, de kiu oni vidis la tutan malhele verdan picean arbaron. La sennombraj branĉopintoj similis al grandega soldataro, vastiĝinta ĉiudirekte sur la monto. Oriente sur la blua ĉielo reliefigis la neĝokovrita Ĉerni Vraĥ (Nigra Pinto). Sed de sude densiĝis malhelaj nuboj. Sur la herbejo solida ŝtona rifuĝejo kun fajrujo proponas al la turistoj sekuran ŝirmejon, se ekfuriozus tempesto. Apud ĝi gaje murmuris fontano kun klara malvarma akvo. Atingante la herbejon, la maljuna viro ne haltis ĉi tie, sed malaperis inter la piceoj... Tie staris la ŝtonego. Antaŭ ĝia piedo jam kuŝis amasigitaj kronoj el freŝaj floroj. Nenio estis ŝanĝita de la tempo. Nur la piceoj ĉirkaŭe estis kreskintaj kiel grandeguloj kaj tra la densaj



ombroj apenaŭ penetris la sunradioj. Silento!. Li tuŝis mane la grizan malvarman ŝtonegon, sur kiu estis ĉizita jena surskribo:

„Ĉi tie la 18-an de majo 1924 okazis la unua nelegala konferenco de la Bulgara Komunista Partio.“

Kvazaŭ tio estis okazinta hieraŭ kaj ne antaŭ kvindek du jaroj! Kiom el liaj kamaradoj, kun kiuj li kunvenis en tiu ĉi memorinda tago, pereis en la batalo, kiom el ili mortis! Li ĝisvivis la venkon, fordonis siajn fortojn por la kreo de la nova vivo, sed nun... ho, ve!... li ne plu estas la iama fortika viro.

Malĝojo kaj senfortiĝo ekposedis lin. Li sentis malvarmon kaj surmetis la jakon.

En tiu ĉi momento li aŭdis paŝojn kaj turniĝis surprizite. Estis la blondhara junulo. Ĝustatempe li estis veninta. De li ŝprucis la tuta varmo kaj freŝo de la printempa tago...

— Pardonu min, — li diris konfuzite. — Sed mi maltrankviliĝis pro vi kaj dum la tuta tempo mi sekvis vin.

— Vi estas pardonita, — respondis kortuŝite la veterano. — Eĉ mi ege ĝojas, ke vi estas ĉe mi.

Li etendis sian manon, kiun la junulo forte premis. Kvazaŭ per tiu ĉi manpremo la maljuna komunisto transdonis la aferon de sia vivo al la kom-somolano.

Malantaŭ ili kiel muta atestanto staris la ŝtonego.

Ivan Draganov

Kiom li?

PRINTEMPO EN MALJUNECO

Iu delikate tuŝis al li la kobuton. Li turniĝis: apude sidis ne tiom maljuna virino, kun agrabla vizaĝo kaj brilantaj okuloj. Ŝi atendis unu minuton kaj ridetante ekparolis:

— Vi estas samideano Stefĉjo, ĉu ne? Certe vi ankoraŭ ne povas rekonigi min! Jes, kompreneble, pasis jam tiom multe da jaroj depost nia. . .

Aŭdinte tiujn ĉi vortojn li fiksis scivolan rigardon al la vizaĝo de la virino. La voĉo ŝajnis konata kaj komencis rememorigi al li ion. Kaj subite, kvazaŭ vekiĝinte el profunda dormo, li apenaŭ retenis sian fortan emocion kaj ekkriis tenere:

— Asja! Vi, Asja, tie ĉi?! Vi nun sidas apud mi post preskaŭ kvindekjara disiĝo? Ĉu vere? Ĉu mi kredu al miaj okuloj? Ĉu mi ne songas?

Li parolis kun rigardo fiksitita sur ŝi admire kaj ĝue. La rememoroj enfluis lian animon kiel printempa torento. Eh, juneco, juneco kara! . . .

Tiu ĉi renkontiĝo okazis en la teatra salono de urbo S. dum inaŭguro de esperantista kongreso.

La virino ankoraŭ havis viglan kaj energian aspekton. Ŝia brusto estas ornamita per ordeno pro partopreno en la batalo kontraŭ la faŝismo, kaj apud la ordeno kvazaŭ ridetis la verda stelo. Li ankaŭ estis honorita per ordeno, sed ne ĉiam portis ĝin surbruste. Tamen ankaŭ sur la deflekso de lia vesto brilis la verda stelo. Per sia ĉizilo la tempo estis faldinta lian frunton, kaj la jaroj tre frue estis abunde surŝutintaj lian kapon per arĝento. Sed malgraŭ tio ankaŭ li havis viglan kaj vivĝojan aspekton.

La antaŭtagmeza kunsido de la kongreso finiĝis. Stefan kaj Asja urĝis sin eliri kaj rakonti ĉion unu al la alia. Ja ili havis tiom multe da travivaĵoj, amasitaj impresoj, rememoroj, pri kiuj ambaŭ sincere deziris paroli, longe paroli. . .

Post tagmango en proksima restoracio ili eksidis sur benkon en la ĝardeneto antaŭ la kongresejo. Antaŭ ilia imago projekciĝis la filmo de ilia pasinta vivo. Kaj ofte ili interrompis unu la alian penante preterlasi nemon:

— Asja, ĉu vi rememoras tion? Kaj ankaŭ tion?

— Jes, Stefĉjo! Sed ankaŭ vi ne forgesis tion kaj tion, ĉu ne? — ripetis ŝi ofte.

—————

Jaro 1916. Fora pasinteco. Ili lernis kune en la lasta klaso de la gimnazio. Ambaŭ partoprenis kurson de stenografio. Ili progresis rapide kaj post la kurso estiĝis bonaj stenografoj. En tiu tempo Stefĉjo hazarde vidis la Esperanto-lernolibron de Georgi Oreŝkov kaj Hristo Popov, kaj ili kune komencis studi entuziasme ankaŭ la Internacian Lingvon. Baldaŭ ili komencis korespondi kun alilandaj esperantistoj. Ho, kian grandan ĝojon ili travivis ricevinte la unuajn Esperanto-leterojn el fremdlando! Iom post iom Asja kaj Stefĉjo ekhavis korespondantojn en dekoj da landoj el diversaj kontinentoj kaj komencis senti sin loĝantoj de la tuta tero.

Post la gimnazio ili fariĝis instruistoj en la regiono de urbo X., en vilaĝoj proksimaj unu al la alia. Ofte en diversaj ĉirkaŭaj vilaĝoj oni organizis renkontiĝojn de instruistoj kaj ili havis eblon intervidiĝi.

Jaro 1921. Jen Stefan kaj Asja estas delegitoj de kongreso de instruistoj kiel membroj de la instruista organizaĵo ĉe la Bulgara Laborista Socialdemokrata Partio (mallarĝaj socialistoj). En tiu kongreso, okazinta en Sofio, ili por la unua fojo havis la feliĉon vidi Georgi Dimitrov. Li vizitis la kongreson kaj faris mallongan, sed inspiroplenan paroladon.

Jen alia bildo. Dum la kongresaj tagoj Stefan kaj Asja vizitis la sindikatan domon, kiu tiutempe troviĝis sur

strato „Kiril — i Metodij“. Dum ili grimpis al la supra etaĝo, kontraŭ ili laŭ la ŝtuparo malsupreniris homo kun griza hararo kaj longa blanka barbo. Lia vizaĝo brilis, kaj li mem aspektis kiel sanktulo. Stefan kaj Asja rapide retiriĝis flanken, kaptis sin je la manoj kaj cedis vojon al la fama maljunulo, kiun ĉiuj estime nomis „Djado (Avo) Blagoev“. Li ekridetis kaj alparolis la junajn homojn. La bonŝanco vidi persone la „avon“, amatan de la tuta laborista klaso, tre ĝojigis ilin. Tiu renkonto kun Dimitro Blagoev — la patriarko de la socialismo en Bulgario, restis por ĉiam en ilia memoro.

Post la kongreso ĉiu revenis en sian vilaĝon. Pasis ne longa tempo. Stefan kaj Asja devis viziti distriktan konferencon de la instruistoj en urbo S., kie prelegis famaj pedagogoj. Ili ambaŭ partoprenis la konferencon kiel stenografiistoj. Intertempe Stefan estis enoficiigita kiel instruisto en urbo X. Tie li fariĝis sekretario de la loka instruista grupo. Sed venis 1923 — la jaro de la malsukcesa Septembra Ribelo. Stefan estis arestita pro siaj progresemaj politikaj konceptoj. Post sia liberigo li devis forlasi la urbon ne havante eblon adiaŭi kun Asja. Li longe serĉis ŝin, demandis diversajn konatojn, sed vane. Asja estis malaperinta sen iu ajn postsigno. Depost tiu tragika tago pasis preskaŭ kvindek jaroj.

Kaj jen ili estis denove kune, unu apud la alia, kontentaj, feliĉaj. Sinsekvis reciprokaj demandoj, respondoj, admirkrioj. Ŝi rakontis pri sia liberigo el la arestejo kaj pri sia batalo kontraŭ la monstra faŝismo. . .

Fascinantaj, karaj rememoroj! La animoj de Stefan kaj Asja estis plenaj de neesprimebla ĝojo. Ambaŭ geamikoj denove sentis sin junaj malgraŭ la premanta ŝarĝo de la jaroj. La tremantaj manoj intertuŝis sin delikate kaj la lipoj flustris tenere:

— Ĉu vi memoras? . . . Ĉu vi rememoras? . . .

SEPTEMBRA VENTO

La septembra vento ŝvebas super jaroj kaj junec',
portas ĝi aromon freŝan de liber' kaj sekurec'. . .
Ĝi ĉeestas niajn kantojn, videbliĝas en la pens',
en la rev' realigita, en jubila homa mens'.
Vivas ĝi en niaj koroj, ĝi estiĝas ideal' —
tiu praa fajro, kiun ni heredis el batal'.
Kaj en la popoltriumfo, en la bolo de l'labor' —
ĉefa devo estas gardi ĝin per brusto kaj honor',
por ke estu ĉiam pura nia blua firmament',
kontraŭ la militminac' de iu agresema gent'.
Nia devo estas sekvi kun serena memkonsci'
ĝin laŭ ĝiaj ardaj paŝoj, ĝia saĝo, ĝia sci'!

JUNULINA KANTO

Se estus vi rozfloro en mia florgardeno,
tuj mi aliformiĝus en hirtan griznubeton, —
kaj per freŝiga roso en la maten' serena
aspergus mi gutetojn por via belaspekto.

Sed floro vi ne estas kaj pro senbrida amo
per la tremantaj lipoj min vi kisadus arde.
En via brusto vira kaŝita estas flamo,
kaj min bruligas fajro. Ne estu nesingarda!

Se estus vi kolombo grizpluma, flugilhava,
ĉe brusto emocia tenere vin mi premus,
karesus vin mi ame en la forgeso rava,
kaj en la brakoj milde dumnokte vin mi tenus.

Sed birdo vi ne estas kaj vidas mi kun timo:
ĉe vi sin kaŝas ŝtormo kaj ĝi min pereigos,
pro forta am' sufoke brakumos vi senlime . . .
Kaj post pereco mia, ho, kiu vin amegos?

AŬTUNA HUMORO

Malhelas la inspiro de l'kora sindonemo.
Delonge kor' ne kantas, ne ŝprucas ampoemo.
Mi iras sub la nuboj grizplumbaj, pluvoportaj,
kirliĝas ĉe la vento nur la folioj mortaj.

Asperge gutas ĉie, la pluv' ne trankviliĝas.
Ĉe ĝi demand' ĉiama kruele restariĝas,
kaj nur al mi mem triste mi povas ĝin adresi:
„Ho, iam mi, veinda, ĉu povus vin forgesi?“

La 39-a Kongreso de la Bulgara E-Asocio en Ruse unuanime decidis, ke la abonkotizo de „Bulgara Esperantisto“ plialtiĝu je 2 levoj.

Ĉiu distrikta kaj societa estraro devas senprokraste ellabori konkretan planon pri vasta abonkampanjo de nia asocia organo por 1977. Uzu ĉiujn fortojn kaj eblecojn de viaj aktivuloj! Agu energie kaj laŭplane!

Ni nepre kolektu 6000!

LA PLEJ JUNA BOFILINO

„Dio mia, tiu ido konkeris mian koron. Unue ŝi konkeris mian filon, la plej junan, la plej koramatan de mi. Nun ŝi konkeris min“, — pensas la maljuna patrino kaj kliniĝis denove super fera, malnovtempa kesto por serĉi sur ĝia fundo la tukon, kie ŝi estis kaŝinta ormonerojn.

„Mi donos al ŝi unu ormoneron, — plue pensas la maljuna patrino, — mi donos al ŝi. — Tiu ido tute turnis min al si“, — kaj ŝi malnodis la tukon por serĉi la ormoneron. Ŝiaj lipoj ridetis.

„Neniu el la aliaj bofilinoj estis tiel afablaj al mi. Sed tiu ido, la plej juna bofilino, enirante tra la pordo, kun sia belega rideto brilis tiel, kvazaŭ la suno eniris mian domon. Kaj kiam ŝi brakumis min kaj plorante diris „panjo“, — dio mia, mia koro fandigis. Ŝi ploris, karesante mian vizaĝon, plorigis ankaŭ min kaj mian filon, kaj la najbarojn, kiuj alvenis. . .

La aliaj bofilinoj, kiuj ĉeestis, nur rigardis mirigite. Tamen mi tute forgesis, ke mi devas esti kiel ĉiam severa antaŭ la bofilinoj kaj la najbaroj. Kaj jen mi diris al la junulino: „Vi, filino, kial vi ploras, kio okazis al vi?“

Finfine, ŝi viŝis siajn larmojn, ekridetis kaj brakumante denove min, diris: „Dio mia, denove mi havas patrinon!“

Kvazaŭ mia koro turniĝis en la brusto pro tiuj vortoj. Ja kompatinda orfo ŝi estis. Sen patrino ŝi kreskis, ĉiam fremdaj homoj estis ĉirkaŭ ŝi. Por patrino ŝi ploris tage kaj nokte.

Kaj de tiam ŝi ne povas satiĝi je mi. Ĉiam: „Panjo, venu por vidi, ĉu tio estas bone ordigita! Panjo, ĉu mi devas tiel prepari tion?“ ktp. ktp. Kaj kvankam mi volas esti severa kiel antaŭe, sed mia koro ekstrema, mi lasas la ŝpinbastonon kaj iras por vidi, kion ŝi montros al mi. Ŝi pli bone scias ĉion ol mi, ĉu mi ne vidas tion, sed

volas montri al mi respekton, demandi min. Agrable estas por ŝi diri al mi „panjo“ kaj scii, ke ŝi havas patrinon, kun kiu ŝi povas konsiliĝi. Kaj la ceteraj malpli junaj bofilinoj rigardas mirigite. Ankaŭ ili ne scias, kion fari.

Antaŭe ili tute ne venis al mi, sed nun preskaŭ ĉiutage estas ĉi tie. Ĉiam ili trovas pretekston por veni. Kaj tiu ido, la juna bofilino, kiam vidas ilin, kvazaŭ estas venintaj iuj nobelinoj. Ŝi tuj ekkuras por proponi al ili seĝon kaj ĉiam ridetante diras al ĉiuj: „Fratino, fratinjo“, kvazaŭ longe, longe vivis kun ili. Se ŝi estus naskita en tiu ĉi domo, ŝi ne povus alkitimiĝi pli bone. Sekigitajn fruktojn ŝi donas al ili, per kremo de lakto regalias ilin, kaj mi rigardas kaj agrable estas al mi. Eĉ ne per unu vorto mi diras: „He, bofilino, kial estas tiu regalado? Kial tiu ĉi malŝparado?“ Pli frue mia koro kuntiriĝis, kiam mi vidis tian elspezon. Konkeris min tiu ido, konkeris min. . .“

La maljuna patrino rigardas la ormoneretojn, trarigardas ĉiujn kaj ne estas kontenta. Ŝi serĉas pli kaj pli grandan.

„Se mi donas al ŝi ormoneron, ĉu estus malbone? El ŝia buŝo ĉiam oro falas. Kiam ŝi diras al mi: „Panjo, la tuta vilaĝo parolas tiel bone pri vi, pri tio, ke vi faris donacojn al la infanoj de la kompatinda vidvino“, al mi fariĝas agrable, agrable. Ŝi mem petis min fari tiujn donacojn, sed pri mi la vilaĝanoj bone parolas. Ĝis nun neniam okazis io simila. Ĉiuj opiniis, ke mi estas avarulino, malbona, kaj nun ili tiel bone parolas pri mi. Tio estas miraklo!

La aliaj bofilinoj antaŭe ne malfermis la buŝojn por diri al mi „patrino“, sed nun ĉiam „panjo“, „panjo“ anticipas unu la alian. Kaj iliaj infanoj ne eliras el mia domo.



Vere, oni diras, ke urbaninoj estas malbonaj, fieraj, sed tiun junulinon mia filo venigis el la urbo. Li atendis ŝin fini sian lernadon kaj tuj alkondukis ŝin tien ĉi. Ŝi povas esti instruistino, kaj certe ŝi estos... Sed kiel agrable estas al mi, kiam ŝi diras: Kara panjo, kiel bele estas ĉi tie! Kiel hela estas la monto! La suno brilas, la aero estas pura! Kaj ŝi kantas kaj ĝojas pri ĉio.

Tamen mi miras. La monto estas ĉiam la sama... Kiomfoje mi supreniris ĝin por serĉi drogherbojn, kiam la infanoj estis malsanaj... La suno same tiel ĉiam lumas... Sed neniam venis al mi penso ĝoji pri ĉio, kiel ŝi.

Ŝi karesas la infanojn de la aliaj bofilinoj, kaj ili ne volas disiĝi de ŝi. Ŝi lavas ilin, ligas rubandojn sur iliaj haroj, kaj ili rigardas ŝin en la okulojn kaj atendas, kion ŝi diros. Dio mia, tiu ido konkeris ĉiujn...

Se ŝi naskos al mi nepon, arĝentan zonon mi faros por ŝi, la orajn braceletojn mi donos al ŝi — nur ke la ido estu kiel ŝi! Mi ne naskis filinon, sed nur knabojn, nur freneze kuraĝajn junulojn. Nun mi komprenis la dolĉecon de la filino. Se mi estus iomete malĝoja, ŝi venas al mi kaj demandas: „Panjo, kio okazis al vi? Ĉu vi havas kapdoloron?“ La junuloj neniam demandis min tiel. Kaj nun, se mi ne

fartas bone, pro ŝiaj dolĉaj vortoj ĉio forpasas...”

Tiel pensas la maljuna patrino kaj nerimarkite apartigas plej grandan ormoneron.

„Morgaŭ, estas festotago, ĝuste tiam mi donos ĝin al ŝi, por ke ŝi rememoru min kaj mian edzon. Oh, kial li ne estas nun ĉi tie, por iom ĝoji pri ŝi. Ĉar li suferis, ke mi ne naskis al li filinon. Sed nun tia filino venis en nian domon...”

La maljuna patrino denove metas sur la fundon de la antikva sako la tukon kun la riĉaĵo, ŝparita dum ŝia tuta vivo. Sed estas mirinde, ke ŝi jam ne zorge flegas siajn ormonerojn. Ŝi ne leviĝas nokte por vidi, ĉu ili estas en la sako. En ŝia koro estas pli granda riĉaĵo ol la ormoneroj, kiujn ŝi estas kolektinta per ŝvito sur la frunto. Tio estas la amo, kiu tra nekonataj vojoj sin enŝovas en ŝian koron kaj ofte igas la maljunan patrinon ekkanti tiel, kiel en la junaĝo.

— Panjo! — ŝi aŭdas dolĉan voĉon el la najbara ĉambro.

La maljuna patrino rapide ŝovas la ormoneron en sian poŝon kaj ekiras al la pordo.

— Mi venas, mi venas, filino mia, — ŝi respondas. — Oh, tiu ido konkeris plene min, — ŝi murmuris al si mem, sed al ŝia koro estas agrable, agrable.

Mihail Ĉobanov

LA RIDETO DE ESTONTA PATRINO

En tiu mateno la aŭtomobiloj svarmis sur la larĝa strato. La homoj en la aŭtomobiloj estis senpaciencaj kaj koncentris sian atenton al la signaloj. Sur la trotuaro ne estis multe da homoj. Eble pro tio mi rimarkis ŝin. Ŝi marŝis absorbite en si. Plej ĉarma rideto floris sur ŝiaj lipoj. Ne nur sur ŝiaj lipoj, sur ŝia tuta vizaĝo. Ne nur la vizaĝo, ŝia tuta estaĵo radiis la ĉarmon de tiu rideto.

Ŝi marŝis absorbite en si. Ŝi iris kontraŭ la sunon, ŝi mem bela suno — unu juna graveda virino, en progresinta gravedeco. Ŝi portis la sunon en si! Ŝi portis unu vivon.

Verŝajne ŝi vidis la sunan aleon, sur kiu ŝi promenas kun multe da patrinoj, sed en ŝia bebokaleŝo ridetas kun la plej radia rideto ŝia bebo — knabo aŭ knabino.

Eble kun la infanbiciklo la plej

vivplena, la plej impeta estas ŝia filo eta! Verŝajne, la plej bela rubando estas sur la kapo de ŝia filineto.

Eble ŝi vidis en la manifestacio dum la bela festo de la du fratoj Kiril kaj Metodi sian kvinaklasanon ŝveligi la vangojn per la fanfaro kaj tute impete fanfari: „Popol' renaskiĝinta, marŝu!“ Verŝajne ŝia filineto ĉe la sama manifestacio, en etere malpeza tuniko, levas sur sia kapeto korbeton kun rozoj, ŝi mem unu roza burĝono: „Popol' renaskiĝinta, marŝu“

Ŝi marŝas kontraŭ la sunon, portante en si la sunon, lumigata de la plej ĉarma homa rideto.

Eble ŝi vidas ŝtupareton, sur kies plej alta platformo staras ŝia filo kaj radiante klinas la kapon, por ke la prezidanto povu kroĉi sur lian kolon la plej altan premion de la olimpiaj ludoj.

Verŝajne tie staris ŝia filino, levinta la manon por saluti la mondon, kaj post momento la orkestro plenumos nian nacian himnon kaj malrapide al la plej alta fostopinto leviĝas la standardo de nia patrolando.

Marŝas juna graveda virino — estonta patrino. Absorbata en si, lumigita de la plej ĉarma rideto.

Verŝajne ŝi vidas sian filon, jam mondfaman scienculon kun arĝente

griza hararo, starantan ĉe katedro. Kun aliaj akademianoj li konigas siajn grandegajn atingojn, kaj la tuta aŭditorio sin klinas antaŭ la modesta virino, la patrino, kiu naskis kaj edukis tiun filon de la patrolando. Eble ŝi diras al si: „Ho, tiam mi estos tute, tute maljuna!“ Kaj ree la rideto lumigas la vizaĝon de la juna estonta patrino.

Ankoraŭ kiom da emociantaj momentoj ŝi vidas. . . Verŝajne dum niaj grandaj festoj — la Naŭa de Septembro aŭ la Unua de Majo, — ŝia filo aŭ ŝia filino estas honoritaj per ŝtataj premioj aŭ tutpopolaj rekonoj pro grandaj atingoj en nia multflanka vivo. Sed nepre pro bonegaj homaj, civitanaj agoj, faritaj de ŝia filo aŭ filino, la patrino, portanta la estontan vivon, estas lumigata de tiu ĉarma rideto.

Kaj kiam ŝi ridetas, radiata de la suno, ŝi, la estonta patrino, trankvila pri la morgaŭa tago, kredas, ke ŝia idovivos nur en ĝojo kaj mildaj zorgoj. Jes! Ŝia rideto devigas nin! Kaj se ni pli atente rigardus la estontan patrinon, nia sento de respondeco al ĉiu membro de nia socio estus pli vera, kaj ni mem estus pli bonaj.

Kaj la infanoj — la estonteco de la partujo — pli feliĉaj kaj pli dankaj al nia kara patrujo — Popola Respubliko Bulgario.

Nadja Jejnova

BOMBARDO

El mia taglibro, aprilo 1969, Damasko

Frua mateno. La aero estis plena de aromo de floroj, kiuj abundis en la ĝardenoj. Multe da abeloj zumis flugante de korolo al korolo. Nina, mia konata bulgarino, edzino de arabo Maruan Dardari, sendis sian serviston por inviti min fari kun ili matenpromenadon al la proksima ĝardeno. Tuj mi preparis min kaj iris al ŝia domo, kiu estis kontraŭ la korto.

La infanoj de Nina Ĝoni kaj Ĝudi

jam atendis min antaŭ la korta pordo. Ili renkontis min kun granda ĝojo, kurante al mi. Ĉiuj ni kune iris al la urba ĝardeno, kie kreskis mediteraneaj pinoj, dekoraciaj arboj kaj diversaj floroj inter ili. La aero estis freŝa, la infanoj ĝoje ludis, postkurante unu la alian.

Estis mirinde bela tago! La suno malavare sendis sunradiojn, kiuj mildakis la teron.



De ĉiuj balkonoj de la domoj sonis radio aŭ televidelsendoj, kiuj anoncis la novaĵojn. Poste sekvis muzika programo. La urbanoj aŭskultis ĝin trinkante kafon aŭ refreŝigan trinkaĵon.

Subite ni aŭdis bruon de multe da aviadiloj. La bruo proksimiĝis rapide. Mi komprenis, ke ĝi venas de pezaj bombaviadiloj. Mi ektimis kaj tuj diris:

— Kara Nina, mi petas vin, ni devas reveni hejmen. Aŭskultu, tiu ĉi bruo ne estas ordinara. Ŝajnas al mi, ke tio estas pezaj bombaviadiloj.

Nina respondis tute trankvile:

— Ho, kara onklino, estas neniu kaŭzo por maltrankvilo. Aŭskultu — de ĉiuj radioriceviloj kaj televidiloj ĝoje sonas belaj kantoj. Ĉiuj homoj estas trankvilaj.

Sed subite ni aŭdis eksplodon de bomboj. Malgraŭ tio ĉiuj civitanoj trankvile daŭrigis siajn okupojn. Min surprizis ilia trankvilo.

Nevole mi rememoris pri la teruraĵoj

de la milito, kiujn ni travivis en nia lando, kaj pri la senkulpaj viktimoj de la bombadoj. Por mi estis klare, ke tiuj homoj ne havas ideon, kion signifas milito kaj bombado. Tuj mi prenis la manon de Ĝoni kaj ekkuris rapide. Ankaŭ Nina kaj Ĝudi kuris post nin. Jen ni alvenis la hejmon de Nina kaj ŝi tuj ŝaltis la televidilon. Aŭdiĝis voĉo:

— Atenton, atenton! Civitanoj, okazas bombardo. Vi ĉiuj restu aŭ kaŝu vin en la domoj. Neniu eliru sur la straton!...

Poste mi komprenis, ke la israelaj bombaviadiloj serĉis la militfabrikon. Ne sukcesinte trovi ĝin, ili bombardis la malriĉulan kvartalon apud la militfabriko. En ĝi loĝis nur laboristoj.

La kruela bombardo detruis la tutan kvartalon kaj prenis multnombrajn viktimojn. De tiam la loĝantoj de Damasko kaj de tuta Sirio komprenis, kion signifas bombardo kaj milito de barbara agresanto.

Asen Grigorov

ORAJ SABLOJ

1. LA ĜANGALO

Jam estas for la granda urbo!
Forestas bruo kaj perturbo.
Ne ĝenas televido min,
nek estas rapidado, kuro.
Troviĝas mi en la naturo,
la protektanta prapatrin'.
Ĉirkaŭas min arbaro virga
kaj bluas super mi ĉiel',
sonoras gaja kanto birda
kaj sonas zumo de abel'.
Jen estas mia laborloko:
la seĝo — muskohava bloko,
kaj skribotablo — la genu'.
Inspiras min paruoj du
per sia amo sinforĝesa,
per tuŝo milda kaj karesa,
per sentoj, kiuj kaŝas sin
en mia plej profunda sin'.
Per longaj fingroj la lianoj
protekte kovras min.

Per manoj
velure mola arb' acera
salutas min kun sving' tenera.

En tiu ĉi matena horo
silentas laro kaj leporo,
silentas kverko kaj karpeno
kaj mutas musko kaj likeno
kaj en la dormetanta valo
silentas, mutas la ĝangalo.

2. LA ORA STRANDO

La suno lumas altĉiele.
Tin-tin-tin-tin! — sonoras hele
tintiloj de azena ĉaro,
kaj en la ĉaro — ama paro.
Plezuroj, ĝuoj kaj agrabloj. . .
Promenas sur la Oraj Sabloj
senzorge bunta homtorento.
Ĉeestas vere la Babelo:
germanoj el la Okcidento,
rumanoj, rusoj, viroj polaj,
polinoj sveltaj, cignokolaj
en bankostumoj, minijupoj,
solece, pare kaj en grupoj.
Junuloj, viroj kaj virinoj,
francinoj, belaj bulgarinoj



sur benkoj en la ombro sidas,
 babilas kaj provoke ridas,
 kaj oni aŭdas lingvojn fremdajn,
 petolajn ŝercojn, vortojn ventajn.
 Jen pasas junulino svelta —
 estaĵ' etera de l' edeno,
 alloga kiel marsireno,
 ŝi vokas miron kaj admiron,
 sopirojn ardajn kaj dezirojn. ...

Ĉe l' Nigra Mar' la Ora Strando
 ripozas pace — brilanto
 brilanta per la oro glima.
 La maro — revo malproksima —
 etendas sin al la senlima
 nebulkovrita horizonto.

Kuradas ondo post la ondo,
 senĉese, sinforgese plaŭdas.
 La kanton de la mar' mi aŭdas
 pri tiu ĉi unika lando,
 kaj brilas, brilas Ora Strando.

3. HO, BULGARIO

Ho, Bulgario, land' naskiĝa!
 Senfine estas mi feliĉa,
 ke vin mi nomas patroland',
 ĝarden' de rozoj, suda suno,
 sukplenaj fruktoj, ora strand'!
 Popoloj-fratoj vin adoras,
 belaĵojn viajn rememoras:
 pint' Musala, la plejaltulo,
 droninta en matennebulo,
 la lagoj de montaro Rila,
 de Plovdiv la beleco brila.
 Ĉu gemon Smoljan flankenlasi?
 Ĉu Velingradon preterpasi?
 Pri Târnovo ne diri laŭdon?
 Atendas ili la aplaŭdon —
 kaj tiu Ora Strando kara
 de nia bordo Nigramara,
 kaj tiuj valoj, altaj montoj,
 kaj krutaj rokoj, horizontoj
 de Vitoŝa kaj de Pirln' ...
 Ho patroland', mi amas vin!

Proŝo

LA HOMEKO KAJ TIES VALORO

Iun septembran vesperon mi vizitis
 la kunvenon de la Sofia E-societo
 „Maksim Gorkij“. Mi estis veninta io-
 mete malfrue kaj trafis la finon de
 vojaĝpriskribo. Post la kutimaj deba-
 toj oni donis la parolon al fremdlanda
 gastino — pola samideanino.

Ĉe la tribuno la gastino deklaris
 emocie, ke ŝi ne povas paroli trank-
 vile pri siaj unuaj impresoj de nia
 lando kaj homoj kaj rakontis koncizan
 okazintaĵon el sia veturado al Sofio.

— Kiam mi elvagoniĝis ĉe la Sofia
 Stacidomo, mi kontrolis mian pakaĵon.
 Ĝi estis en ordo. En la stacidoma
 atendejo tamen mi malkovris la man-
 kon de mia mansaketo, en kiu estis
 dokumentoj kaj mono — bulgara kaj
 dolara valutoj. Mi alkuris returne al
 la vagono kaj traserĉis ĉiujn eblajn
 lokojn, sed la mansaketo mankis. . .
 Mi ekploris. Ĉe mi venis la vagona
 purigistino kaj komprenis mian situa-
 cion. Tiam ŝi tuj kondukis min al la
 ĉambro de la deĵora milicisto. Mi akom-
 panis ŝin sen kia ajn espero. Bonŝance,
 tie staris fervojisto, kiu tenis enmane
 mian saketon. Li redonis ĝin al mi.

La enhavo estis netuŝita. Nenio man-
 kis. Pro ĝojo mi preskaŭ forgesis dan-
 ki! Poste mi ekdeziris doni al la bona
 homo modestan rekompencan. Li ri-
 fuzis ĝentile.

— „Vi estas fremlanda gastino, kaj
 la mono estas pli necesa al vi“, —
 motivis sian rifuzon tiu vere milda
 homo.

— Mi kredas, karaj bulgaraj sami-
 deanoj, ke en alia lando tio ne povus
 okazi! — deklaris la gastino kaj en-
 tuziasme, kaj hiperbole.

Mi preterpasas la pluajn eldirojn de
 la menciita polino. Ili koncernis la bul-
 garan gastamon kaj la naturbelaĵojn,
 per kiuj nia lando estas malavare
 dotita.

Jen alia okazo.

Mi iris al la urbeto Bankja — fama
 ripozloko kaj kuracejo. Tie feris mia
 lerneja kamarado, kaj mi intencis lin
 viziti. Nia renkontiĝo ne okazis. Tiun
 tagon oni organizis perbusan ekskur-
 son al monto Vitoŝa kaj mia amiko estis
 forveturinta kun la ekskursantoj.

Dum mi atendis vagonaron al So-
 fio, mi decidis tagmanĝi rapide en la



seacidoma bufedo. Tie laboris nur unu ktnerino. Ŝi estis juna virino, tre trankvila kaj kun enviinda lerteco. La klientaron ŝi priservis vere kulture kaj akurate. Per sia konduto ŝi kreis kvietan kaj agrablan atmosferon. Tagmanĝante mi eksentis varmon. Mi malvestis la jakon kaj metis ĝin sur la seĝan apogilon. Poste mi ekatendis por pagi la konsumadon. La kelnerino venis, informis min pri la alveno de la trajno kaj konsilis min ne rapidi, ĉar estas sufiĉa tempo. Mi pagis per la moneroj, kiuj tintis en la poŝo de la pantalono, kaj ekiris al la trajno. Estis al mi nekutime malpeze, sed pri la kialo mi ne pensis. En la vagono mi trovis bonan lokon apud la fenestro kaj ekatendis la ekiron de la trajno.

Kaj jen — post kelkaj minutoj en la kupeo aperis la kelnerino de la stacidoma bufedo. Ŝi portis mian jakon, kiun mi estis forgesinta sur la seĝa apogilo.

— Mi tre timis, ke la trajno ekirus antaŭ ol mi trovus vin! — ŝi diris. — Pro rapideco vi forgesis vian jakon. Jen ĝi estas. Agrablan veturadon!

Ŝi ŝovis la jakon en miajn manojn, forkuris eksteren kaj elvagoniĝis preskaŭ dum la ekiro de la trajno. Mi apenaŭ sukcesis danki al ŝi tra la fenestro. Responde ŝi leĝere kapsignis, ridetis sincere kaj iris al sia klientaro. Nun mi komprenis, kial antaŭ kelkaj minutoj al mi estis nekutime malpeze. . .

Mi estis forte kortuŝita. . . En la poŝo de mia jakto estis la monujo, kiu enhavis la ricevitan salajron kaj kelkmonatan gratifikon — sentebla monsumo. . . En ĝi estis ankaŭ iuj dokumentoj, la veturbileto, la trama karto. . .

Tiu tago estis unu el la belegaj tagoj de mia ekzistado! Mi estis renkontinta veran homon kun honesta koro kaj senriproĉa eduko.

Mi aktivigis mian memorkapablon por konstati, kiom da similaj tagoj en mia vivo kortuŝis min. Ili ne estis malmultaj. La vivo disponigis al mi renkontiĝon kun multaj veraj bomoj.

Per sia konduto ili firmigis ĉe mi la kredon en la boneco, en la nobleco de la homo. . .

Antaŭ pli ol dudek jaroj mi estis mobilizita kiel rezerva soldato en vilaĝo Gega, Ograĵden-montaro. Ĝis tiam mi tute ne konis tiun lokon de nia Respubliko. Malklaraj supozoj turmentis min kaj mi ekveturis tien malgaja. Mia pesimismo tamen montriĝis tute vana. . .

Dum varmega tago de junio ni, triopo da soldatoj, peze plandis laŭ la ŝtondeklivoj de Ograĵden al Gega. Tiu parto de la montaro estis nuda, senarbara. Ni vidis multajn torentojn, kies akvo, kvankam kristale pura, ne kontentigis la soifon, ĉar estis varma kiel teo. La aero ardis kvazaŭ en forno.

Maljuna virino, kondukanta azenon, atingis nin. La bruto estis ŝargita per sako, plenaj je pano. Kiel ni komprenis, en ŝia vilaĝo ne estis panbakejo kaj ŝi estis iranta por la pano ĉiutaga en vilaĝo Skrât, troviĝanta en la piedoj de Belasica-monto.

— Kien vi iras? — ŝi demandis nin.

— Al via vilaĝo, avinjo! — respondis senripense la soldato, kiu gvidis nin.

— Metu vian pakaĵon sur la selon! Mi lasos ĝin en la komunumo, — invitis nin la avineto.

Ni kompatis la bruton kaj rifuzis. Sed la maljunulino persistis kaj finfine ni cedis. Mi donis mian tutan pakaĵon plus paron da novaj soldatŝuoj, ĉar mi marŝis piedvestita en ŝtofaj sportaj ŝuoj kun kaŭĉukaj plandumoj. Pro la malpezigo ni sentis agrablon kaj nia irado fariĝis pli vigla. La avineto akcelis la azenon per energia vergofrapo kaj ekmarŝis post ĝi en leĝera ĵermario, karakteriza pri homoj loĝantaj en montaro.

Posttagmeze nin aspergis pluvo kaj la atmosfero fariĝis tolerebla. Ĉe vesperiĝo ni atingis Gega. Tiu vilaĝo havas belegan situon kaj pitoreskan montaran dekoron. Ĝiaj 15—20 dometoj blankiĝas kvazaŭ sukerpecoj, disĵetitaj sur la deklivoj. Nin renkontis soldato,

atendinta nin tutan tagon. Li estis ĝoja pro nia alveno. Ni demandis pri nia pakaĵo kaj rakontis pri la avineto, kondukanta azenon.

— Ŝi preterpasis la komunumon kaj iris en sian vilaĝon, Ĉurilo, — diris la soldato.

Al ni fariĝis klare, ke la soldato, kiu gvidis nin, pro sia rapida, senpripensa respondo kaŭzis la miskomprenon. La avineto ne estis el Gega, sed el la najbara vilaĝo Ĉurilo.

— Kaj nun, kien ni serĉu la pakaĵon!? — ni veis senhelpaj.

— Ne timu! En tiu montaro la homoj estas la plej honestaj en la mondo! Ili nek ŝtelas, nek mensogas. Ĉi tie la ŝtelado estas nekonata afero. Mi garantias, ke via pakaĵo revenos al ni! — trankviligis nin la soldato.

Li priridis tiun, kiu nin gvidis, ke li loĝas jam tutan jaron en Gega kaj ne konas la loĝantojn.

Post tri tagoj la avineto alportis nian pakaĵon. Nature, nenio el ĝi mankis. La maljunulino pardonpetis, ke ŝi ne demandis nin pri la ĝusta loko de nia soldatservo. . .

— Maljuniĝis mi, knaboj, kaj stultiĝis! — sin kulpigis tiu honesta kaj bonkora virino.

Ege kortuŝitaj pro ŝia honesteco ni kisis al ŝi la manon.

— Kial vi faras tion? Mi eraris kaj vi, idoj, kisas mian manon! Mi ne meritas! — ŝi reagis konfuzite.

La saman tempon ĉe ni haltis la vilaĝestro kaj scivoleme rigardis la scenon. La maljunulino riproĉis lin, ke li retenas la soldatojn nur en Gega kaj intence ne sendas almenaŭ kelkajn en Ĉurilo.

— Ĉu ni ne estas homoj? — protestis ŝi.

Kompreneble, la vilaĝestro neniel kulpis pri tio, sed la maljunulino firme kredis sian diron.

Oni klarigis al mi, ke la ĉi tiea loĝantaro tre estimas kaj protektas la soldatojn. Post nelonga tempo mi mem konstatis tion.

La ĉirkaŭaĵo de Gega estis mirinde bela. Nokte nin dormigis la kanto de rivero Gradeŝnica, kies ŝtonkuŝejo estis kruta kaj kaskada. . . Proksime de vilaĝo Ĉurilo estis granda akvofalo. La preĝejo de monaĥejo „Sankta Ilija“ posedis freskojn pentritajn antaŭ unu jarcento. La koloroj tamen radiis, kvaŝaŭ la farboj estis ĵus metitaj. La vilaĝeto, kvankam malgranda, estis kleriga centro. Iu instruisto senmortigis sian nomon greftante rozon al robuso. Ĉi tie naskiĝis la fama kontraŭfaŝisma batalanto Anton Popov. . .

Do, la plej valoraj en la vilaĝeto estis la homoj. Ĉiuj familioj estis multmembraj. En ĉiu hejmo kreskis po 7—8 infanoj. Iliaj sonoraj voĉoj eĥis libere kaj vigligis la atmosferon. Pro la suno kaj la freŝa aero tiuj montanidoj estis sanaj kaj energiaj. Se ni akseptus la aserton, ke la idaro estas riĉaĵo, la loĝantoj de Gega estis riĉuloj. Sed la zorgo por tiom da infanoj ne estis facila afero. En nefruktodonaj jaroj la homoj apenaŭ perlaboris la ĉiutagan panon.

Malgraŭ tio, kiam tiuj neriĉaj montaranoj trovas ion perditan ili ne alproprigas ĝin. Honesta vorto, ili preferas morti pro malsato, sed ne ŝteli! La trovitaĵon ili portas al al vilaĝa komunumo. La posedanto ĉiam trovas ĝin tie!

Persone mi mem kelkfoje trovis tie mian monujon, mian poŝhorloĝon, pri kiu mi fieris, ĉar tiutempe la horloĝoj estis deficitaj, miajn sunrezistajn okulvitrojn kaj la fontoplumon kun la ora plumo. . . Ordinare tiuj aĵoj elfalis el miaj poŝoj, kiam mi iris por bani min en unu el la torrentoj apud la vilaĝeto.

Certe tiu, kiu trovis ilin, ne estis riĉulo. Li povus sperti sur sin la tenton alproprigi la monon aŭ la horloĝon. Sed li estis anime riĉa kaj ege homeca.

Tiuj honestaj homoj neniam fanfaronis pri siaj noblaj agoj. Mi supozas, ke ili ne donis apartan signifon al tio,



kion ili faris rigardante ĝin tute ordinara, en la kutima ordo de la aferoj.

Oni komencis konstrui en Gega panbakejon. Kune kun kelkaj vilaĝaj gejunuloj mi estis unu el la volontuloj helpantaj la masonistojn. Mi portis per sitelo malsekan teron, kiu anstataŭis la morteron, kaj brikojn. Mi ne sukcesis vidi la objekton finkonstruita, ĉar miaj komandantoj vokis min en Blagoevgrad, kie mi pasigis la restan parton de la rezervista soldatservo. De

tiu tempo mi ne plu vizitis Gega. Ekde tiam multe da akvo forfluis en rivero Gradeŝnica. . .

Delonge forpasis la tempo, kiam la loĝantaro de Gega iris en Skrât por aĉeti panon. Ĝi jam estas forgesita. Aŭ ĝi apartenas al la malnovaj rememoroj.

Miaj rememoroj pri Gega kaj pri la homoj de Gega tamen estas por ĉiam freŝaj kaj nevelkantaj.

Dimitro Dimov

OKULOJ

*Al Slavi Dojĉev**

Malfacile ĝustigus mi tuj
la koloron de viaj okuloj —
ĉu en ili superis la blu',
aŭ sin kaŝis en ili du kugloj. . .

Aŭ plej ofte en via pupil'
videbligis sparketo metala,
kvazaŭ flagris en ĝi la rebril'
de hardita fandaĵo de ŝtalo.

Kaj kelkfoje estiĝis l' iris'
malhelverda mem kiel la maro
aŭ plenigis ĝin helo kaj griz'
de la plumoj flugilaj de l' laro.

Tamen kiam varmkora ridet'
ekradiis sur via vizaĝo,
ĝi vidigis kun ĉarma akcent',
ke vi estis nur dudekjaraĝa.

Ne forviŝis la mort' kun malic'
la belecon de viaj okuloj
ilin fermis la skurg' de l' polic',
sed vi restis por ĉiam junulo. . .

Ĉar mortante kovrite de sang'
flustris vi nur : „Mi scias nenion“,
dum mordita tra dentoj la lang'
ne eldiris parolon alian.

Urĝe flugas la temp'! Kaj la viv'
jam blankigis miajn nigrajn harojn,
sed restadas sensanĝaĵ nur vi
kaj senmortaj tra l' marŝo de l' jaroj.

Vi, okuloj, okuloj de venk',
de malam', de batal' kaj espero,
staru plue sur via posten'
por defendo de nia libero!

* Slavi Dojĉev estis sekretario de la nelegala komunista organizaĵo en la regiono de vilaĝo Slânĉevo, apud Varna. Esperantiĝis en 1939. Lin murdis en 1944 la polico post kruela skurgado, ĉar li denunciis nek unu el siaj kamaradoj en la batalo.

La ideo pri paco kaj internacia amikeco estas baza ideo de la E-movado.

Esperantistoj, karaj pacbatalantoj, subskribu amase la novan Stokholman Apelon! Instigu viajn proksimulojn kaj konatojn subskribi ĝin! Pli da subskriboj — pli da impona manifestiĝo de nia volo al amikeco kaj kunlaborado inter la popoloj, al paco kaj sekureco sur nia planedo!

MIA AMATA TER'

Mia amata ter',
kunodoro de humo
 kaj sun' . . .
Mia multvalora ter',
en printempo kun vastaj kampoj,
kiuj naskas
 grandgrajnran oran grenon.

Mi alvenas al vi,
ĉe vi mi haltas. . .
Vi estas mia ĝojo kaj dolor',
vi estas mia konscio
 kaj sort' . . .

Aŭtune,
kliniĝinta de fruktoj
 kaj sun',
kiel kara patrin'
ĝojon kaj esperon
 en unu vi kunigas. . .

Mia amata ter',
vi donas al mi de viaj fortoj,
de via trankvilo
kaj nekoruptec',
de via malavareco
 kaj etern' . . .

Vi instruas min,
kiel vi batalas
kontraŭ la herbaĉoj,
 kiuj vin sufokas,
kontraŭ la sekeco,
 kontraŭ la frosto,
 kontraŭ la ventoj —
ĝis plena venko!

Por ke mia animo
 estu pura
kiel plugita novalo
 en printemp',
por ke elkresku la semoj,
prisemitaj en penigaj tagoj. . .
Por ke venku la boneco.
Por ke estu ĝojo
 por ĉiuj!

Mia amata ter',
mia doloro kaj ĝojo,
mia vivo
 kaj hela esper'. . .
Ĉion vi donas
kaj ĉion vi prenas!

Violin Oljanov

AMIKO

Estis ni amikoj. Kune
loĝis, marŝis kaj promenis,
manĝis panon ni komune,
kaj se io kroma venis.

Estis bonaj ni amikoj,
ŝatis arde disputadi,
kiam spikis la tritikoj,
kiam zumis la cikadoj.

Reliefis juna revo
en malsataj niaj koroj,
kaj ne foris ni de l'devo —
la socian korpon bori.

Sed ekestis vintro frosta,
sur la stratoj vento hurlis.
Ĝis medolo de la ostoj
tranĉis sento misaŭgura.

Februara nokt' alarma
frapis sur la pordon krude,
kaj invadis fiĝendarmoj,
iris for kunfrato trude.

Kvar okuloj adiaŭis
en obskuro februara. . .
Kaj la vent' rikane plaŭdis,
en akordo muĝis maro.

— — — — —
Pasis nokto la obskura,
kaj ekestis tago hela.
Brilas suno en purpuro
sur floranta kampo bela.

Sola nun al la tritiko
min revokas juna sento,
kaj staranta la amiko
sur granita monumento.



LA SOVETA SOLDATO

En la mondo estas ŝtato —
de la paco ŝtala ŝild':
plej fidela defendanto,
panjo kara kaj fratin'.
Ĝi atingas oceanojn,
neĝo brilas sur la mont'.
Kreskas la uzinoj novaj
ĉe senlima horizont'.
Multajn fojojn jam minacis
ĝin malnobla agresant',
ĉiam tamen lin rebatis
la soveta batalant'.

En dekoka ĝin invadis
kruelega mortigant'.
Tra kubanaj kampoj marŝis,
Dnepron pasis lia band'.
Dekkvar ŝtatoj kurĵetiĝis
hurle, kun terura fort'
kontraŭ la skarлата flago,
kontraŭ Lenin-sociord'.
Sed ektimis kaj forkuris
tiuj gastoj el fremland',
forpelitaj kaj venkitaj
de l'soveta batalant'.

En la jar' kvardekunua
reinvadis malamik',
sed eltiris sabron akran
kaj kartvelo, kaj kozak',
ruso kaj siberiano
armis sin per karaben'
kaj la flagon stelohavan
portis ĝis Berlino mem.
La libero marŝis ĉie
post la kuraĝul'-soldat',
liberigis nin denove
la soveta batalant'.

Kaj nuntempe kampoj floras
en heroa patroland',
konstruitaj hele brilas
Volgo-Don kaj Dneprostroj.
Jen feliĉaj homoj kantas
en Ukrain' kaj Altaj.
Kiu staras sur posteno —
klare estas al la mond':
inter ĉiuj kuraĝuloj
li — plej brava kamarad',
li — amiko sindonema,
batalanto kaj soldat'.

El la bulgara: Lili Koleva

Hristo Radevski

LEONO KAJ KAMELEONO

En sia ĉambro sidis la leon'.
La hund-lake' anoncis riverence:
„Atendas por akcept' senpacience
jam centan fojon la kameleon'.“

Leono — oni scias — sen tolero
kondukas ĉiam al kameleon'.
Do li ekskuis kapon kun impon'
kaj grumblis laŭte kun kolero:

„Informu lin, ke okupata estas mi,
ke li sciigu vin pri peto sia!“
La hund'ekbojis kun servemo fia:
„Bukedon tamen portas li al vi!“

Respondis la leon' malafablete:
„Ne eblas per buked' aĉeti min.“
Sed poste pli ĝentile turnis sin:
„Nu, li eniru nur por iomete!“

La larĝa pordo malfermiĝis tuj.
El ĝi sin montris la kameleono
kun floroj plej aromaj de l'sezono
en luksa blanka porcelana uj'.

Li jen fandiĝas en ridet' atabla:
„Pardonu la aŭdacon mian vi;
permeson por admiro petas mi
al via kolharar kaj voĉ' agrabla!“

„Koncize!“ — lin ĉesigis la leon'.
„Ĉi florojn.. mi.. por via leonino,
por tiu ĉi plej fama belulino,
vidata de la mond', laŭ mia kon'...“

Kaj por eviti la leono dramon,
la florojn prenis kune kun la vaz'...
Lekinte liajn krurojn en ekstaz',
la gast' daŭrigis sian amdeklamon:

„Kaj via ido indas por envi',
eh, mirinfano vera — glori al dio!
Ja ĉu ĝi povus esti do alio,
se ĝia ĉarma patro estas vi!“

Ekkaptis la leonon la agrablo
pro l' milda flato de l'kameleon'.
Li reverencis al li el la tron'
kaj lin invitis al la manĝotablo.

El la bulgara: Dimitro Haĝiev — Tempesto

MIAJ ARBOJ

Mi ricevis leteron de iama amiko el la universitato — riĉa bienposedanto, aristokrato. Li invitis min al sia bieno.

Mi sciis, ke li delonge estas malsana, blinda, paralizita, apenaŭ iras... Mi forveturis.

Mi lin tiovis en unu el la aleoj de lia vasta parko. Volvita en pelt, malgraŭ ke estis somero — velkinta, ŝrumpinta, kun verda ombrelo super la okuloj, li sidis en malgranda ĉareto, kiun du lakeoj en ruĝaj livreoj puŝis...

— Bonvenon, — li flustris per tomba voĉo, — en mian heredbienon, en la ombro de miaj centjaraj kverkoj!

Super lia kapo kiel tendo etendis siajn branĉojn potenca miljara kverko.

Mi pensis: „Ho, miljara giganto, ĉu vi aŭdas? Duone mortinta vermo, rampanta ĉe viaj radikoj, vin nomas sia arbo!“

Sed jen ekblovis venteto kaj mallaŭte eksusuris la densa foliaro de la giganto... Kaj ŝajnis al mi, ke la maljuna kverko respondas kun bonanima kaj mallaŭta rido kaj al mia penso, kaj al la fanfaronado de la malsanulo...

El la rusa: Rajna Konstantinova

Penju Stojanov

KOMPASO

Per blankaj monumentoj kovriĝas nia lando, levigas ili alten sur montoj kaj en valoj — popola rekonajo por bravo kaj fiero, pro la verŝita sango en liberecbataloj.

Dronintaj en silento la monumentoj montras la vojon, kiu iras al nia alta celo, tra rokoj kaj ravinoj, tra baroj kaj distancoj al la feliĉ' popola sen halto, sen ŝancelo.

Kompaso ili estas por la bulgara ŝipo
naĝanta ĉiam rekte tra l' vasta oceano.
Laŭ tiu ĉi kompasoj ĝin gvidas la partio —
la kara kaj fidela, kuraĝa kapitano.

Ismet Ĉebi

LA MONO

Delonge vi evitas mian povran moŝton.
Vi faras tion, ĉar vi malŝatas mian poŝon.
Al bonhavuloj senkonscie vi obeas,
al parazitaj klasoj ĉiame vi lakeas.

Per vi mildiĝas homdoloroj kaj suferoj,
per vi aĉuloj sin ŝajnigas ĉarme belaj,
per vi mortkondamnitajn oni amnestias,
pro vi eĉ reĝa moŝt' abnegacias.

Ĉu ne diigas vi diboĉajn riĉulinojn?
Ĉu antaŭ tribunal' vi ne defendas krimojn?
Malamikigas vi eĉ la ĝemelojn verajn,
senkulpajn homojn piedpuŝas en inferon.

Vi estas ĉiopova, ho metalo flava,
famigi povas vi eĉ kapon tute kavan,
malligi la kuŝanton sur la tortura benko,
dangĉeron deflankigi kaj konkeri venkon.

Okulojn blindajn via bril' kuracas,
babiloj de stultuloj al saĝuloj plaĉas.
Aspektas plaĉe eĉ vizaĝoj abomenaj,
vi amikigas eĉ diablon kun anĝelo!

El la turka: A. Asker



MALLIBERULO

Mi sidas post krad' en humida karcer'.
Aglido, kreskinta en la malliber',
flugilon svingante malgaja kunfrat'
sangantan nutraĵon bekadas ĉe l' krad'.

Ĝi ŝiras kaj ĵetas (fenestren rigrad'),
kun mi kvazaŭ samon sopiras kun ard',
min vokas okule kaj per la kriad':
„Pli baldaŭ forflugu do ni, kamarad'!”

Ni — birdoj liberaj! Jam venis la hor' —
al mont, kiu blankas post nubo en for',
al land', kie bluas plaŭdanta marond'
kaj flugas sen bar' mi... kaj vent'-vagabond'!”

*Elrusigis Nikolaj Fedotov,
Novoĉerkask, USSR*

PER ESPERANTO MI ĈIRKAŬPRENIS LA MONDON...

Kiam mi estis malgranda knabo, mi revis ĉirkaŭpreni la tutan spacon, kiu ĉirkaŭas min. Sed tiu spaco estis tute malgranda parteto de la mondo. Ĝi limigis sin je la salonego de unu teatro kaj la publiko, kiu estis en ĝi. Mi revis ĉirkaŭpreni tiun publikon, dirante: „Vi estas mia!”

Dum mia frua aĝo miaj gepatroj gvidis min por spekti teatrajn prezentojn kaj partopreni en similaj prezentoj. Mia amo al la teatro, al la arto naskiĝis, kiam mi komencis havi konscion pri mi mem, kiam ankoraŭ sesjara mi vidis mian patrinon sur la scenejo de la iama Kooperativa Teatro ĉe placo „Vâzrajdane” roli kun la gastrolanta eminenta eksterlanda aktoro Ŝaĥatuni. Tiam, turnante min al mia avino, mi ekkriis: „Nu! Tio estas... panjo!”

Poste mi estis konstanta vizitanto de la tiama Opereta Teatro. Ĉu estis eble, ke miaj familianoj vizitu spektaklon sen mi?! Ke ili lasu min sola hejme?! Ho, tio ĉi povus kaŭzi „ŝtormon” de ploro kaj de infanaj kriegoj... Ne, tio ne estis ebla! Neniu sukcesus kontraŭstari kaj mi ĉiam altrudis mian deziron — esti egalrajta ano de la grupo, kiu vizitas la teatron...

En nia hejmo oni parolis kaj diskutis ĉiutage pri la teatra arto. Kaj ne povus esti alie.

Mia patrino, kiel disĉiplo de nia eminenta aktoro, reĝisoro kaj pedagogo Stojan Bâčvarov, kune kun mia patro estis en la grupo de tiuj aktoroj, kiuj fondis la operetan teatron en mia naskiĝurbo Varna. Malfeliĉe, ke mia patro tiel frue forlasis nin — li pereis en la batalo kontraŭ la faŝismo.

Kiam mi jam estis naŭjara, oni akceptis min en la infana teatra lernejo de la reĝisoro Nikolaj Fol. Mi montris miajn unuajn aktoraĵojn eblecojn. Oni pritaksis ilin favore. Mi komencis ludi ĉefajn rolojn en la infanaj prezentoj. Kaj jen — iun tagon oni akceptis min ankaŭ en la Nacia Teatro „Ivan Vazov”, kie mi komencis ludi infanajn rolojn.

Mi estis ŝatata ankaŭ de la dramverkisto de la teatro, la konata bulgara poeto Nikolaj Liliev. Nia amikeco daŭris longajn jarojn. Mi montris al li versaĵojn, kiujn mi verkis, kaj li kuraĝigis min.

Tamen al mia „anim-ardo” tiutempe ne sufiĉis nur la dramarto. Mi komencis plenumi infanajn etajn rolojn en la operaj prezentoj, ĉar la opera kolektivo ludis siajn spektaklojn en la sama teatro. Mi atente observadis la vergon de la orkestra direktisto, strebante al pura kantado.

Kara leganto, samideano, esperantisto-aktivulo!

Ne atendu la lastan tagon por aboni nian asocian organon por 1977! Abonu ĝin tuj, senprokraste! Ne forgesu, ke abono estas ebla nur per la poŝto! Abonigu aliajn — ĉiam kaj ĉie! Okupu dignan lokon sur nia honora VERDA TABULO!

Ankaŭ nun ni atingu 6000!

Okazis tiel, ke foje la reĝisoro Dragan Kârĝiev, la orkestro-direktisto Asen Najdenov kaj la muzika helpanto Ljubomir Pipkov (kun kiu mi lernis muzike miajn etajn rolojn) demandis min, ĉu kiam mi finos la studadon, mi deziras studi plu en la tiama muzik-akademio. Kiam mi revenis hejmen, mi rakontis al miaj gepatroj pri tiu interparolo. Sed mia duonpatro, kiu estis homo reale rigardanta al la vivo, diris, ke laŭ lia opinio, de mi ne estiĝos eminenta opera kantisto. Se mi estas decidinta estiĝi aktoro, mi devas strebi al la dramarto. Per mia ne tiel forta voĉo mi povus kanti ankaŭ kanzonajn danckantojn, kio estas pli proksima al la dramarto.

Mi konsentis ne sen interna anima batalo, tamen mi konvinkiĝis pri la praveco de liaj paroloj kiam, post kelkaj jaroj, mi havis unuajn partoprenojn kiel kanzon-kantisto, akompanata de orkestro dum la amuzvesperoj en la salonego de la tiama „Slava Societo“. Tie por mia surprizo, post unu-du partoprenoj mi havis grandan sukceson. La amuzvesperoj okazis sabate kaj dimanĉe. Mi, kiel gimnaziano, kantis sur la estrado sekrete. Sed la publiko venis amase. La posedanto gajnis monon kaj mi — gloron. Mi eĉ ne pensis, ke oni devas pagi al mi honorarion.

Oni povas diri, ke de tiam (1939—1940) mi ekamis la kanzonan danckanton kaj okupiĝis pri verkado de diversaj tekstoj dum la tuta tempo de studado en la Supera Teatra Lernejo.

Poste kiel aktoro en la Teatro de la Armeo, unu el kies kreintoj estas mi, mi konatiĝis kun la kanzona pianisto kaj voĉ-pedagogo Evgenij Komarov, kiu ekdeziris labori kun mi. Ni plenumis niajn memstarajn koncertojn kaj komencis partopreni en diversaj ĝaz-spektakloj de la Koncerta Direkcio. La kanzona kant-arto daŭre ekposedis min.

Kiel okazis, ke mi ekkantis en Esperanto, kaj kiel mi estiĝis esperantisto kaj komencis verki la tekstojn de miaj kantoj en tiu lingvo?

Foje mi estis en la legejo de la Kulturdomo „Vladimir Zaimov“ por ordigi kun la kassistino iujn kontojn pri miaj koncertoj.

La ĉambron eniris virino, kiu serĉis la prezidanton de la Kulturdomo, la poeton Atanas Duškov. Li estis promesinta disponigi al ŝi ĉambron por vespera kurso de Esperanto, kiun ŝi intencis gvidi. Kiam mi aŭdis tion, mi adresis min al la virino, dirante duonserĉe: Ĉu mi povus kanti miajn kantojn en tiu lingvo?”

Kompreninte, ke mi estas aktoro, la virino komencis konvinke paroli al mi, ke per Esperanto mi povus estiĝi tutmonde konata kantisto. Mi silente aŭskultis. Ŝi insistis, ke la sekvontan tagon ni renkontiĝu sur placo „Slavejkov“, por ke ŝi konduku min al E-kunveno de la societo de la poŝtistoj „Heroldo“, kie bona tradukisto tradukus miajn kanto-tekstojn en Esperanton. Mi promesis veni al la loko de la renkontiĝo, sed ne tiel konvinkita, ke mi nepre faros tion. Reveninte hej-

men mi havis pri tio interparolon kun mia edzino. Ŝi turnis sin al mi tute serioze kaj insistis, ke mi nepre iru al la esperantistoj kaj lernu la nekonatan lingvon.

La sekvan tagon mi vidis, ke Viktoria Dimitrova jam atendas min ĉe placo „Slavejkov“. Ŝi kondukis min al la Centra Poŝtejo, kie ni eniris la ĉambron de la tiama prezidanto de „Heroldo“ — Miĥail Geraskov. Ĉeestis multe da esperantistoj. Konfuzite mi ekstaris ĉe la pordo de la ĉambro. Sed mia akompanantino ekkriis: „Jen! Mi kondukas lin!“

S-ano Geraskov, kiu gvidis la kunvenon, invitis min eniri kaj klarigis al la ĉeestantoj: „Samideanoj! Ekde nun en nia Esperanto-societo ni havas novan membron, aktorin!“ Ĉiuj komencis aplaŭdi. Mi ne rememoras, kiamaniere mi pasis preter ĉiuj por eksidi sur iun liberan seĝon — tiom mi estis konfuzita!

Komenciĝis la lingva kurso. Gvidis ĝin s-ano Stefan Kiraĝiev. Kaj ĉar mi jam estis lerninta latinan lingvon, la signifo de multaj esperantaj vortoj evidentiĝis konata al mi. Mi kuraĝigis min, ke mi facile ellernos Esperanton.

Ofte mi pensas: ĉu nun s-anino Viktoria Dimitrova pritaksas la servon, kiun ŝi faris tiam al mi? Mia danko al ŝi estas granda kaj ĉiama!

Post la fino de la kunveno s-ano Kiraĝiev prenis la tekstojn de kelkaj el miaj kantoj. Li promesis traduki ilin en Esperanton kaj vere li plenumis sian promeson. Tiu bonkora homo, jam ne plu vivanta, restos ĉiam en mia memoro kun granda danko.

Tiel mi komencis lerni miajn kantojn ankaŭ en Esperanto. Same tiel mi komencis partopreni per ili la kunvenojn kaj amuzvesperojn, kiujn la geesperantistoj aranĝis.

Lernante la tekstojn de la kantoj, veturante tra nia lando kune kun la koncerta grupo de la popola kantisto Boris Maŝalov, mi lernis ankaŭ la Internacian Lingvon. En urboj kaj vilaĝoj kantante en la koncerta programo iujn el la kantoj ankaŭ en Esperanto, mi strebis propagandi la Internacian Lingvon, kiu estiĝis por mi tre ŝatata.

Multaj aŭskultantoj post la koncertoj venis al mi demandante, kiu estas tiu tiel belsona lingvo kaj de kie ili povus trovi lernolibrojn por lerni ĝin.

Mi ne rememoras al kiom da homoj mi sendis lernolibrojn senkompanse. Ĝojige estas ke iuj el ili anoncas sin al mi dum UK de Esperanto en eksterlando dirante, ke dank'al miaj kantoj ili estiĝis esperantistoj. Tio ĉi estas la plej granda rekompenco por mia Esperanto-laboro. . .

Kiamaniere mi komencis traduki la tekstojn de miaj kantoj en Esperanton kaj verki originalajn en la sama lingvo?

Jen kiel tio okazis.

Iun tagon, veninte al kunveno, mi sidiĝis ĉe nian estimatan esperantistinon Milka Popova. Ni komencis interparoli. Ŝi demandis,



ĉu mi pliriĉigos mian repertuaron per novaj kantoj en Esperanto. Mi respondis, ke tio ĉi efektiviĝos tre malfacile, ĉar la tekstojn mi devas doni al iu tradukisto kaj poste mi devas atendi la tradukon longan tempon. Ŝi ekrigardis min kaj diris: „Ne gravas!... Nun la tekstojn tradukas al vi aliaj homoj, sed venos tempo, kiam vi mem tradukos ilin. Eĉ vi mem verkos en nia lingvo!...“. Mi estis tre surprizita. „Kion parolas ŝi? — mi diris al mi. Ne estas facile por iu ajn verki versaĵojn en fremda lingvo. Des pli en Esperanto, kiun mi devas ekde nun lerni obstine. Do, se tio ĉi okazos, ho, eble devas pasi multaj jaroj!...“

Tiel, tute certa, ke mi ne estas kapabla verki la tekstojn de miaj kantoj en Esperanto, mi enpensiĝis aŭskultante la sekvan lecionon, instruatan de nia kara instruanto (jam mortinto) Dimitro Karagjozov.

Forpasis tempo — tagoj... monatoj. Tamen io okazis en mia cerbo. Mi ekdeziris provi, ĉu mi povus verki en Esperanto tekston de nova kanto.

Kiam mi aŭskultis, kiamaniere la malnovaj esperantistoj libere interparolas kun s-ano Karagjozov, mi konfesis al li, ke, simple dirite, mi havas la deziron plori, ĉar mi ne povas rapide ellerni la lingvon. Sed li respondis: „Ne rapidu!... Ne perfortu vian memoron!... Venos momento, kiam ĉio, kion vi nun lernas, elnaĝos en la memoro. Kiam vi ne atendas, tiam vi komencos kompreni ĉion, kion oni parolas en Esperanto, kaj vi mem ekparolos...“ Evidentiĝis, ke li pravas.

Ĉu mi povus forgesi lin, la homon, kiu subtenis miajn unuajn paŝojn en la lingvo?... La homo, kiu morale subtenis min en la komenco... Li estos ĉiam viva en mia koro!

La koncerta grupo de la rondo, en kiu estis mi, veturis per aŭtobuso al urbo Marica. Dum tiu veturado en mia kapo komencis maturiĝi melodio de kanteto. Mi rapide komencis skribi ĝin, farante improvizite notliniojn sur hazarda peco da papero. Kaj kune kun la melodio elsaltis en mia memoro la unuaj vortoj de la estonta teksto: „Bonan nokton, kara mia amatino!...“

La grupo alvenis la urbon kaj la aŭtobuso haltis ĉe la hotelo, kie ni devis tranokti. Dum

oni aranĝis la administrajn formalaĵojn, mi sidis sur benkon ĉe la sama konstruaĵo, finante la melodion kaj en ĉefaj trajtoj ankaŭ la tekston. Poste en la hotela ĉambro la teksto estis relaborita. Mi estis senfine feliĉa! Ja mi verkis tekston rekte en Esperanto! Mi rememoris la vortojn de Milka Popova kaj sincere dankis al ŝi. Ankaŭ nun, kiam mi verkas novajn kantojn kaj ties tekstojn, mi ĉiam rememoras pri ŝi. Nun ankoraŭ unu homo kiel patro helpas min redaktante miajn tekstojn. Tiu ĉi homo estas Simeon M. Simeonov, nia kapabla tradukisto kaj poeto en la Internacia Lingvo.

La cetero — vi scias ĝin: mia unua granda partopreno en la interkona vespero en halo „Universiada“ dum la Universala Kongreso de Esperanto en Sofio (1963) alportis al mi rekonon de la internacia E-publiko.

Mi estis invitita de polaj samideanoj gastigi en Varsovio, kie la Pola Radio faris la unuajn surbendigojn de miaj kantoj en Esperanto kaj ĝis nun ofte disaŭdigas ilin en sia E-emisio.

Mi komencis ricevi entuziasmajn leterojn de la aŭskultantoj de la Pola Radio el diversaj landoj de la mondo. Ili deziris posedi miajn diskojn. Post kiam Radio Sofia faris surbendigon de miaj kantoj en Esperanto, la Bulgara Esperantista Kooperativo eldonis pere de „Balkanton“ diskojn, kiuj ekvojaĝis al diversaj landoj de la mondo.

Sekvis la invitoj por partoprenoj en la artaj programoj de la universalaj kongresoj en Vieno, Londono, Hamburgo, Beogrado, Kopenhago. En eksterlandaj gazetoj aperis intervjuoj kun mi, reklamoj pri miaj diskoj.

Pro miaj kantoj, kiuj estas kreitaj elkore, la homoj ekamis min mem, kaj tio stimulas mian deziron pli kaj pli verki en Esperanto — dum mia tuta vivo!...

... Kiam mi estis malgranda knabo, mi revis ĉirkaŭpreni la tutan spacon, kiu ĉirkaŭas min. Tiam ĝi estis unu malgranda parteto — la halo de unu teatro. Nun mi vidas, ke per nia amata Internacia lingvo Esperanto mi ĉirkaŭprenas la tutan mondon!

Kaj mi estas senlime feliĉa.

Miŝo Zdravev

Jam aperis nova gramofondisko de Miŝo Zdravev. Ĝi enhavas la kantojn „La unua tago de la printempo“ de Svetozar Rusinov kaj „Mia gitaro“ de la rumana tre populara komponisto Popa. La kantoj estas tradukitaj kaj unuafoje plenumitaj en Esperanto de la artisto-estrada kantisto Miŝo Zdravev.

La disko estos utila helpilo en nia kultur-amasa kaj kursa laboro, konvena donaco por la multnombraj amikoj de la bulgaraj esperantistoj. Ĝi estas havebla de Bulgara Esperantista Kooperativo, str. Neofit Rilski 18, Sofio. Prezo: 0,70 levojn.

VERDAJ STELETOJ

GUTAS PLUVO

Gutas pluvo: pak — pak — pak!
Gajas rano kaj limak'.
Nur skarabo kaj abel'
sin ekscitas ĝis anhel':

„Multas akvo, oj — oj — oj!
Spiras ni en lasta foj'.
Malsekiĝis je malbon'
niaj jako, pantalon'!“

Sed subite kia ĝoj':
staras fungo apud voj'!
Ek, al funga ĉap-ombrel',
skarabeto kaj abel'!

*Kiam gladito
varmiĝas, ni deklamu*

Ljudmila Jevsejeva

NI GLADU MEM

Gladilo mia, gladilet',
varmiĝu tuj, momente!
Mi malfruiĝas al lerneĵ' —
ja tute evidente.

Ĉu ne konfuzas vin l'aspekt'
de mia pantalonon?
Ho, sur horloĝo estas jam
la oka kaj duono.

Varmiĝu, kara amiket',
rapide, sen obstino!
Mi devas veston gladi mem
por helpi al patrino.

DIVENU, DIVENISTO!

1. Kion oni bezonas por vidi tra muro el cemento?

(uonŝeuej)

2. Kion neniu volas havi, sed neniu posedanta ĝin volas perdi?

(uonay uenahues)

3. Kion oni vidas unufoje en minuto, dufoje en momento kaj nenium fojon en jarcento?

(uon noreu e)

4. La patro ankoraŭ ne naskiĝis, sed la filo super la tegmento montriĝis?

(la patro kaj la timo)

5. Kiu aŭdas ĉion, sed diras nenion?

(lojeto ej)

6. Kiu senmane kaj senpiede malfermas la pordon?

(lojeto ej)

7. Ili estas ĝemeloj, sed neniam vidas unu la alian. Kiuj ili estas?

(lojeto ej)

El „La tornistro“

literatura revuo de la Argentina
Esperanto-Instituto, n-roj 2/1974, 4/1976

Distroĵ

Policano venas al la viro, kiu staras ĉe aŭto, kaj demandas: „Ĉu la aŭto estas via?“ La viro respondas: „Ne ĉiam.“ La policano miras: „Kial vi opinias tion?“ La viro klarigas: „Kiam ĝi estas pura, la edzino prenas ĝin. Kiam estas ie balo, prenas ĝin mia filino. Kaj kiam ie okazas futbalmatĉo, mia filo prenas ĝin.“ La policano demandas: „Kaj kiam ĝi estas via?“ La viro respondas: „Kiam estas necese ĝin purigi aŭ ripari.“

Skota paciento demandas la kuraciston dum la matena kontrolo: „Sinjoro doktoro, ĉu vi povas operacii min hodiaŭ je la deksesita?“ La kuracisto diras: „Eble mi povus fari tion, sed kiel vi volas precize je tiu horo?“ La paciento respondas: „Hazarde mia filo hodiaŭ estas en la urbo kun aŭto. Se necese, li veturigos per ĝi mian kadavron hejmen.“

ENIGMO

Serĉu vortojn laŭ la priskriboj. Ĉiu cifero egalas saman literon.

1. Aro da porteblaj loĝejetoj surkampe: 17-2E-3N-4B-5A-6R-70

2. Gaja burleskulo: 5A-6R-8L-2E-9K-2E-3A-70

3. Unu el la noblaj celoj de la E-movado: 10P-5A-11E-70

4. Brila kaj multekosta: 8L-12U-9K-13S-5A

5. Samorda ripetigo de fenomenoj: 11E-14F-9K-8L-70

6. Prepozicio de kvanto: 4D-5A

Anstataŭigu la subajn ciferojn per la trovitaj supre literoj kaj vi ricevos saĝan proverbo—

1E-6R-70-6R-5A-10P-14F-4D-5A-5A-9K-11E-2E-8L-70-3N:

2E-9K-70-3N-4D-12U-9K-5A-13S-5A-8L-11E-2E-8L-70

Flori Nikolov



deziras korespondi

Bulgario

Elena Radeva — ul. Lenin 24, 6300 *Ĥaskovo* (instruistiro — kun ĉi pri ĉt)

II gimnazio «Prof. Aven Zlatarov», la esperantistoj el la 9 klaso, 6300 *Ĥaskovo* (kun gellernartoj el ĉi pri ĉt)

Ardrej S. Guŝev — 5060 Resen, Velikotârovsko (33-jara instruisto — kun ĉi pri ĉt; kolektas alometetikedojn)

Ana Zlateva — ul. Oborisie 17, *Burgas* (18-jara lernantiro — kun ĉi pri ĉt)

Argel Jordarov Dalov — bulv. Osvoboŝdenie 52, *Burgas* (60-jara E-veterano)

Hungario

Korespondantojn por siaj E-gelernartoj (11—14-jaraj) serĉas ilia instruisto: Mozes Daniel — H-2911. *Mosca* (ili kolektas ankaŭ bk, pm, fotojn, insignojn ktp)

Fekete Laszlo — 4002 *Debrecen* 2, Pf 84/R (24-jara radioteknikisto — kun bulgaraj gejunuloj pri turismo, teatro, muziko, radio k. a.)

Agnes Greiz — Kossuth ter 10/b, 1. em. 3, 5000 *Szolnok* (16-jara — kun junaj gebulgaroj)

Jugoslavio

Zofonjka Ksenofan — 4300 *Belovar* (9-jara — pri ĉt, pm, insignoj k. a.)

Pallando

Zenon Salamonczyk — ul. Warszawska 25 m 1, 11—200 *Eartoszyce* (22-jara — kun ĉi pri ĉt, bk, moderna muziko, sporto)

Griegori Koziol — *Włostawiek*, paz. *Koŝyce* 28—510, woj. *Kielce*

Danuta Sadownik — Pl. Wolności 11/3 59—600 *Lwówek Sl.* (19-jara studentino — kun ĉi pri furismo, muziko, teatro)

Petro Kolodziej — p. k. 31.Pl — 44-101

Glivice (fraŭlo — kun ĉi — turismo, geografia, bk, pm)

Grazina Zalewska — PSSP (internat) 16-030 *Suprasl* (17-jara — sporto, pentroarto, bk, pm)

Lucja Kolton — ul. Walowa 40, 27—60 *Sandomierz* (17-jara — kun bulgaraj gejunuloj pri ĉt)

Teresa Wegzyn — ul. M. Reja 10-a, 39—300 *Mielec* (15-jara — pri muziko, sporto, literaturo)

Rumanio

Ignaco Doboŝ — b-dul 1 Mai 18, 4150 *Odorheiu Secuiesc*, jud. Harghita (26-jara — kun gebulgaroj pri ĉt)

Sovetunio

Buzenajte Virginija — 235 300 str. Traku 15, u. *Paneveŝis*, Litovio (20-jara studentino de medicino — kun ĉi pri ĉt) (sur p. IV)



Radio Stara Zagora disaŭdigis intervjuon de Rajno Ĉipilev — prezidanto de DK de BEA en la urbo. La intervjuon ilustris per E-kantoj la lernantoj de instruistino Roza Dimitrova el v. Kolarovol



Gelernantoj el u. Madan ekskurse tra Hungario. Sur la foto: antaŭ monumento en urbo Eger.

En Sofio tute subite forpasis nia aktiva samideano

Ivan Iliev Ĥristov

naskita en 1912 en v. Dojrenci, distrikto de Loveĉ. Kiel komunisto kaj esperantisto li sindone batalis kaj laboris por la venko super la faŝismo kaj por la konstruado de socialisma socio en nia patrolando. Pere de la Infernacia Lingvo li multjare konigis al siaj centoj da amikoj el la tuta mondo la novan vivon en Bulgario kaj ĝiajn belajojn, batalis por paco kaj amikeco inter la popoloj.

BULGARIO

Teksto kaj muziko: Mišo Zdravev

En la pen-soj ka-sas mi ĉar-me-con pri l'na ski-ga lo-ko en pa-truj? Ti-e sen-tis mi pa-trin-mil-de-con kaj pro ti-o mi ek-kan-tos tuj. Bul-ga-ri-o la-la-la-la-se vo-ja-ĝos for, la-la-la-la-mi jam e-stos fil'a-do-rant' por vi kun a-man-ta la-la-la-la-kor'. La la, la...

En la pensoj kaŝas mi ĉarmecon
pri l'naskiĝa loko en patruj'.
Tie sentis mi patrinmildecon
kaj pro tio mi ekkantos tuj:

Refreno:

Bulgario, belega land',
se vojaĝos for,
mi jam estos fil-adorant'
por vi kun amanta kor'.
La la, la...

La montaro en purpurkoloro,
la marbordo ora en freŝec', —
fremdlandanoj ĉiuj vin adoras
pro la pitoreska bild-mildec'!...

Estas ĉiam la bulgarpopolo
tre gastama, brua en la ĝoj' —
blovas tio per la rid' sonora
de l'knabinoj ĉarmaj sur la voj'.

(El paĝo III)

Vitalis Rute — 232 029 Vilnius, detluvos 5-2, Litovio, (19-jara studento de ĵurnalistiko — arto, literaturo, filozofio, junulara vivo)

Andrius Andrijauskas — 232 029 Vilnius, detluvos 5-2, Litovio (20-jara studento de geologio — tekniko, muziko, naturkonservo ktp)

Berezin Genadij — 340 048 Doneck — 48, ab. kesto 308 (27-jara fraŭlo — libroj, sporto, bk, esperantaĵoj — kun ĉi)

Marinuškina Vilija — Kosmonautu 3-10, 235 464 N. Akmene, Litovio (lernantino)

Rimantas Norvilas — 235 700 Kretinga g-vi klaipedos 55, Litovio (15-jara — kun ĉi pri ĉt, pm)

Vladimir Dvorkoviĉ — glavpoĉtamt, do vostrebovanija, 347 900 Taganrog, Rostovskoj obl. (25-jara fraŭlo, laboristo — kun ĉi pri filafelo k. a.)

Kristina Ŝalata — BSHA obŝĉ. 9/80 213410 Gorkij, Mogilevskaja obl. (pola studentino de ĝardenfako, studenta en USSR — kun studentoj de agronomio)

